

Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA LA MONDO ESPERANTO SEMAS SIAJN BONAJOJN.
PLI FACILIGAS LA KOMERCAJN, INTERRILATOJN, KONIGAS,
LA INPAJN, ELTROVOJN, KUNHELPOJN POR ANSTATAVI,
DE FRUKTODONA PACO LA SANGAJN BATALADOJN,
KIUJ DISSTRAS HOMARON.



Alegorio speciale verkita de Sinjoro Pillet, fama gravuristo de medaloj, sendita est. la francan Roman lernejon post ricevo de V granda premio.

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

	Paĝo.
Nuntempaĵoj: La morto de la Regna Dumo (Rusujo)	17 ^a
Pri Esperanto: Ĉirkaŭ la Kongreso, Bibliografio, de <i>Steleto</i> kaj <i>A. Montrosier</i> . — Esperanto kaj Junularo: Projekto de S ^o R. Frenkel; Junularo de A. Bord (Francujo), kun Siberia fotografajo	18 ^a
Muziko: Fr. Schneeberger, Svisa poeto kaj muzikisto, de <i>J. F. (Svisujo)</i>	21 ^a
Diversaĵoj: Sankta Nokto en Esperantujo, de <i>Fr. Schneeberger, filo</i>	21 ^a
Virina paĝo: Modo, de <i>Roksano</i>	22 ^a
Sportoj-Danco: La Tarantelo, Napola danco, de <i>Gr. A. Gallois (Italujo)</i>	23 ^a
Artista aŭ literatura vivado: Rosegger, Germana verkisto, de <i>P. o Christaller, (Germanujo)</i> . — Pri Buchanan, Skota filozofisto, de <i>J. T. Haxton kaj Esp. 8820 (Skotlando)</i>	24 ^a
Komercio kaj Industrio: Blanka Cemento, de <i>Pastro Schneeberger, (Svisujo)</i>	25 ^a
Diversaj sciencoj (Arkeologio): La ruinoj de Wisby, de <i>P. Hedstrom (Svedujo)</i>	26 ^a
Militistaro kaj Maristaro: La Skota glavidanco, de <i>C. Slater (Anglujo)</i>	28 ^a
Turismo: La Meĵje, de <i>H. Sentis (Francujo)</i>	29 ^a
Infana paĝo: Ĵonglaĵoj kaj Eksperimentoj de <i>Jan Saks</i> . Esp. teksto de <i>Amatus (Belgujo)</i>	30 ^a
Felietono: Poŝta amo, de <i>Johano Munoz kaj Pabon, Hispana</i> verkisto, tradukita de <i>Johano Garcia Martin, (Hispanujo)</i>	31 ^a
Artista kaj literatura Aldono: Rembrandt, la fama holanda pentristo, kun belaj ilustraĵoj, de Eŭĵeno Montrosier	I ^a
Mistral, la provenca poeto	IV ^a
Kongresa Aldono: Gvidlibreto de l' Kongresano en Ĝenevo de <i>H. Hodler (Svisujo)</i>	V ^a

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR Miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO al:

Gazeto « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenvalore.

Nevola neakurateco.

Pro trimonata vojaĝo, mi ne povis respondi al ĉiuj personoj, kiuj sendis manuskriptojn.

Bonvolu min senkulpiĝi pri tio: Soj Svačina, Samppa Luoma, Otto Simon, D^o Morgan, Leŭtenanto Salomon, Gr^o Gallois, S^o Bacquet, k. t. p., k. t. p., akceptante miajn sincerajn dankojn pro siaj interesaj verkoj kaj ilustraĵoj.

Oni ne koleretu se, iafoje, oni ne vidas siajn verkojn presitajn tiel frue, kiel oni dezirus: la artikoloj de Leŭtenanto Lesnes kaj Hedstrom, ekz., tamen tiel interesaj kaj bele ilustritaj, atendis sian elpreson dum 8 kaj 10 monatoj. Tre baldaŭ aperos alia pri Alĝerio, de S^o Mende, kun rimarkindaj plumdesegnaĵoj, verkita de unu jaro! Tio igu paciencema.

Nia enketo pri Edukado.

Ankaŭ mi dankas la sendintojn de novaj dokumentoj por la enketo, inter aliaj: S^{ino} Hulanicka, pri virina vivado en rusa lernejo; Leŭtenanto Silvestriev, kiu, je l' nomo de l' Ŝumnes'a grupo, sendis kelkajn diversajn priskribojn pri la Bulgara edukado, kolektitajn dank'al cirkulero enhavanta nian enketan programon kaj sendita, po 25, en Bulgarujo; S^o Stenbuch, pri japana knabina lernejo.

Aliaj dokumentoj rilatas specialan fakon — la militajn lernejojn: itala, de Gr^o Gallois; rusa, de Generalo Levitskij; bulgara, de Leŭtenanto Silvestriev; kaj aliaj estas anoncigitaj.

Denove ni rediras ke *ni ne rapidas*: ni havas la tempon por ni, kaj volas antaŭ ĉio kolekti interesan kaj plenan aron de dokumentoj.

Tiuj, kiuj ĝis nun ne povis verki ion malgraŭ sia intenco, povas nun ĝin fari, utiligante la jaran libertempon, kiel kelkaj afable promesis.

Lastafoje, ni petas por rapida sendo de reabono: oni bonvolu pripensi ke, kun la farado kaj sendo de l' kliŝaĵoj, ia ilustrita loko de la revuo kostas ĉirkaŭe **DEKOBLE** pli ol ne ilustrita loko.

Per tio, oni povas juĝi la preskoston de « Tra la Mondo », kaj ĝian malklarecon kompare je neilustrataj revuoj.

NIA VENONTA NUMERO.

Pro la antaŭaludita vojaĝo, estis neeble al nia redaktoro ĝin kombini. Niaj gelegantoj konas nun sufiĉe sian revuon por esti trankvilaj. La ĉaso en la manuskriptejo estos por ili fruktodona kaj kontentiga.

Al niaj kunlaborantoj.

ATENTU.

Iafoje, manuskriptoj ricevataj estas tiel mallegeble skribitaj, ke ni devas pasigi longan tempon por refari literojn, diferencigi **n** kaj **u**, aldoni punktojn sur la **i** aŭ ĝuste loki ilin en vortoj **kiu** aŭ similaj, skribitaj **kui**.

Kompreneble, tio estas penado senutila, kaj malgraŭ tiu unua korekto, restas multaj preseraroj, kiuj postulas ripetitajn preskorektojn, ĉar la kompostistoj ne estas Esperantistoj, kaj ili kompostas politere, farante tiom da eraroj, kiom estas malbone desegnitaj literoj. Nu, ĉiu preskorekto necesigas 7 aŭ 8 tagojn por la sendo de l' presprovajoj al la presisto, la plenumo de l' korektoj, preso de nova provajo, resendo al ni, nova atenta tralegado kaj resendo al la presisto.

Do, kelkafoje, por ne prokrasti la akuratan eliron de nia revuo, ni forigas unu revidon de l' presprovajoj, kaj donas la prespermeson sur provajoj enhavantaj ankoraŭ multajn erarojn. Kaj ĝis la ricevo de l' unua definitiva kajero de la gazeto ni timas ke, malgraŭ la zorgo de l' kompostisto, restos kelkaj preseraroj.

Por malebligi tiun malagrablaĵon kaj ŝpari al ni bedaŭrindan temperdon, ni *insiste* petas niajn afablajn gekunlaborantojn bonvoli zorge skribi kaj ankaŭ zorgege relegi siajn manuskriptojn por eviti senatentajn mankojn.

LA REDAKTORO.

Pri la Bibliografio: al la aŭtoroj kaj eldonistoj.

De nun, ni faros kiel aliaj revuoj kaj raportos nur pri la verkoj, kies **du** ekzemplerojn ni ricevos: unu por la biblioteko de la revuo kaj la alia por la redaktoro de la bibliografia raporto.



FR. SCHNEEBERGER.

Fr. Schneeberger

Svisa muzikverkisto.

† Muzikverkisto Fr. Schneeberger, la fama patro de nia konata samideano de l' sama nomo, mortis la 21an de Majo 1906 en Biel (Svisujo) en sia 63a vivjaro. Schneeberger, kies muzikverkista nomo, precipe kiel aŭtoro de popolaj kantoj, jam de longe estas konita ankaŭ ekster la limoj de Svisujo, kun senlaca fervoro kaj fera forto, ĉiam modesta, simplecema kaj afabla homo, laboradis por ĉio, kion li estis rekoninta kiel justa kaj bona. Ne nur multegon da kantoj, kiuj kun plej bona sukceso iradis sian vojon, li verkis, sed ankaŭ li kreis pligrandajn muzikverkojn; liaj popoloperoj tre favore estis akceptataj ĉie en Svisujo kaj en svisaj societoj de l'eksterlando. La muziko posedas melodian riĉecon, fortecon kaj indecon; multaj kantoj fariĝis popolokantoj, ĉie konataj kaj kantataj, en la daŭro de malmulte da jaroj.

Schneeberger, same kiel liaj du filoj, kies l' unua estas prezidanto de la Svisa Esperanta Societo, la dua de la Biel'a grupo, estis fervora Esperantisto, kiu propagandis nian ideon ĉiam kaj ĉie. Malgraŭ siaj sesdek jaroj kaj la amaso de siaj laboroj li studadis nian lingvon en ĉiuj liberaj momentoj. Vera plezuro estis por li, ankoraŭ sur la malsanolito, la sciigo, ke konata Esperantisto, S^o L. E. Meier en München, tradukis lian plej konatan kanton: arbarkantado, Esperanten, kaj intencas traduki ankoraŭ aliajn. Jam presita de du jaroj estas Esperanta eldono de l' « Lasta Gotardkondukisto », kies dua korektita eldono baldaŭ aperos. Nove tradukita en Esperanto estas unuakta opero de Schneeberger: « Maroja », kies enhavo estas la liberiĝo de l' grizona kantonano; la opero certe trovos entuziasman akcepton en la tutmonda samideanaro.

Esprimante nian sinceran kondolencon al la familio de nia estinta samideano, ni esperas ke liaj belaj verkoj ĉiam rememorigos lian nomon en Esperantujo.

J. F.



Sankta Nokto en Esperantujo.

de Pastro SCHNEEBERGER (Svisujo).

Ni deziris enpresii ĉi sube muzikon de Schneeberger, ĉar nia presisto, pro manko de specialaj presiloj ne ĝin povis, ni plenigas la paĝon de poeta revo priskribita de la filo de Schneeberger, tute nuneca je la epoko de nia dua kongreso.

En Esperantujo, kiu estas silenta insuleto, meze de pentrinda lago, staras sankta kapeleto, simple, modeste konstruita en verda arbareto. Ekbrilas en sankta nokto, super la preĝejeto, verda stelo, malproksimen lumanfa, kaj vidata de ĉiuj flankoj de la lagbordo. Tie loĝadas, en diversaj lokoj, multaj homoj de malsamaj religioj, malsamaj kutimoj kaj lingvoj. Ili ne konas sin unu la alian, neniam vidis unu la alian, neniam sin parolis. Nun ĉiu el ili ekvidas la verdan lumegon, admiras la verdan stelon, kiu albrilas de la insulo. Senvole ĉiu prenas sian boaton kaj silente alveturas la insuleton, ĉiam rigardante la strangan brilon. Ĝi alvenas, forlasas la ŝipeton, supreniras la arbareton, trovas pordon fermitan; vane ĝi intencas malfermi ĝin.

Jen eksonas sfera harmonio, mistera muziko, kian ĝi neniam aŭdis. La pordo malfermiĝas, ĝi eniras kaj troviĝas en granda halo, kaj kune kun ĝi eniras, tra multaj aliaj pordoj, homoj en strangaj nekonataj vestaĵoj diverskoloraj. Longebarbitaj kaj sen-

barbaj viroj, kun fulmantaj okuloj kaj severaj, kaj tamen amikaj mienoj

Mirigita unu rigardas la alian; nenia vorto ĝenas la solenan momenton. Ekdaŭrigas la muziko harmonia; la vizaĝoj de l' kunvenintoj ekklariĝas kaj ili ekpreĝas silentege, ĉiu alimaniere ol la aliaj: unu starante, la alia genufleksante, unu rigardante teren, la alia ĉielen, unu faldante, la alia levante la manojn.

Kaj vidu, fariĝas dolĉa murmureto de facila vento; sur la kapoj de l' piuloj ekbrilas verdlitere vorto: — Esperanto! — Kaj jen stranga tremeto trafluas ĉiujn korpojn, unu premas la manon de la alia, ĉiuj ĉirkaŭpreniĝas, kaj formiĝas densa rondo; solene kaj unuvoĉe, ĉiuj sankte ĵuras: « Ni esperu kaj amu! »

La halo malheliĝas, la rondo disiĝas kaj sonĝe ĉiu hejmeniras, feliĉigan novan senton en la koro.

PASTRO SCHNEEBERGER.

« Esperanto-muzikejo » Centra strato 42, Biel (Svisujo), ĵus eldonis Arbarkantado, unu el la plej belaj popolokantoj de F. Schneeberger, kies parolojn esperantligris la konata Esperantisto de l' unuaj tagoj, L. E. Meier (Munĥeno).



La Modo. de ROKSANO.

Post la apero de mia antaŭa artikolo, inciteta samideano skribis al mi: « Tute ne estas mirige, ke Georges de Peyrebrune instigas la sekson amindan esti koketa por beliĝi aŭ plibeliĝi, dirante, ke esti bela estas ĝia devo; ĉar.... Georges de Peyrebrune

estas virino !! » Al la malicaj legantoj, kiuj eble havis saman penson kiel la preparolata incitetulo, mi respondas: « Kaj Jacques Richopin kiu, dirinte: «ĉu ami, povi ami, scii ami ne estas via unua devo?» aldiris: « *Esti belaj estas ankaŭ via devo* » ĉu li ne estas viro, li? » Kaj se mi ne timus, ke tro multnombraj citaĵoj ĉerpitaj el *viraj* verkoj igus min teda, ĉu la paĝo rezervita por mia artikolo estus sufiĉa?

Do ne atentante pri la diroj kaj la pensoj de l' « nebela sekso », mi tuj skribos nur por miaj karaj fratinoj, kiuj certe atendas senpacience novajn sciigojn pri nia amata tirano « La Modo ».

Rave vaporaj estas, la nunan someron, la malpezaj tualetoj ornamitaj de punktoj nekred-

deble delikataj; kaj tiel multe ŝatataj estas la veraj punktoj Irlandaj, Veneziaĵaj, Bruselaj, ke l' industrio ne povas liveri da ili en sufiĉeco. Kiel lasta novaĵo, mi citas la Kluni'an punkton, iom forlasitan de kelkaj jaroj, sed kiu revenas al ni kun desegnoj vere ori-

ginalaj. La kudrila kaj kusena punktoj tute modernaj kaj artoplenaj ne estas malŝatataj, — precipe de la neriĉulinoj — kaj mi devas konfesi, ke oni vidas imitaĵojn mirige mirindajn.

Dum la nuna varmega vetero, la muslinaj korsaj-oj kun punktoj el Valenciennes estas netakseblaj pro sia malpezeco, kaj ankaŭ pro sia diafaneco, kiu permesas al la koketemulinoj montri elegantajn korsetkovrilojn.

Por la banaj urboj, tre koketa kaj ĉarmevidiĝa estas la kostumo el blanka tolo ornamita de angla brodaĵo, kiel la belega modelo, kiun mi montras al vi, (elpensita de l' multfama tajloro Bachwitz kaj ĵus publikigita de la Pariza Modo, 37 Avenue de l' Opéra, Paris) kies ĉemizeto estas el batisto kun kravato el tula punkto. Tiuj kostumoj ofte havas kravaton kaj zonumon el sama tolo simile brodita.

Diru al mi, graciaj samideanoj, ĉu vi ne dankas ofte la varman Febuson? Ho! Sufiĉe! Sufiĉe! Tiom da surdigaj « jes » alvenas ĝis mi, ke nepre mi havos kapdolorojn. Mi estis certa, ja, ke, kiel mi, vi ĝin benas, ĉar al ĝi ni ŝuldas la malaperon de l' malgrandaj ĉapeloj, kiuj ne konvene ornamis niajn kapojn, kaj kiuj ne sin harmonie konformigis al niaj ravaj someraj tualetoj. Vere, ili estas ŝatindaj nur por la matenoj kaj la vojaĝoj, tiuj ĉapeletoj. Pasante, mi rekomendas la ĉapelon el blanka tolo, por matenaj ekskursoj kaj sportoj.

Eble, vi jam scias, ke la reveno de la humilaj floroj de l' kamparo sur la plej elegantajn ĉapelojn estas la lasta krio de la Modo. Ceĵanoj, sovaĝaj papavoj, lekantoj fiere vidiĝas sur ili, kaj sukcese konkuras kun la grandegaj rozoj kaj la plumoj; tiuj ĉi estas samkoloraj kiel la pajlo de l' ĉapelo.

La « favorato » de l' sezono estas nekontraŭdir-eble la plaĉa « Charlotte » (Ŝarlot'), tio estas la kapuĉo el brodaĵo, ornamita de multkoloraj rubandoj aŭ de kamparaj floroj, kiu tiel bone ŝirmas kontraŭ la suno.

Adiaŭ, legantinoj miaj, ĝis la venonta sezono.

ROKSANO.





GEDANCANTOJ KAJ MUZIKISTINO.

Napola Danco « Tarantelo. »

Priskribita de Grafo GALLOIS (Italujo).

La teruraj tagoj dum la Vezuvia elsputo estas jam malproksime. Estas revenintaj la senzorgaj horoj por la Napolanoj, kaj la agrablaj momentoj dediĉataj al la fama Tarantelo, la konata ĉi tiea danco. Ĝin priskribis por vi, gelegantoj, nia kunlaboranto Grafo Gallois, dum fotografisto ekkaptis vidaĵon je tri paroj dancantaj.

Sennuba blua ĉielo, ridanta herbejo je verda tapiŝo el delikata herbo, arboj je la densaj branĉetoj; funde, la profilo de Vezuvio kun sia fuma plumfasko; dekstre, la trankvila maro je la dubeverdaj kaj diafanaj akvoj; maldekstre, arbaro de marpinoj; fine, ĉe unua loko, la blankaj domoj de la beleta vilaĝeto « Sorrento ». Jen estas la gaja kaj ĉarma kadro, kiun ni havas antaŭ la okuloj.

La dancado estas tute vigla. Amaso da gejunuloj je pentrindaj kostumoj: la junulinoj je la sufiĉege nigra hararo, kun skarlataj jupoj, antaŭtukoj je la klaraj koloroj, senmanikaj nigraj veluraj korsaĵoj, koralaj ĉirkaŭkoloj, kaj multepezaj oraj orelingoj, kaj ofte malpeza silka skarpo ĉirkaŭ la talio; la junuloj kun mallongaj pantalonoj, ruĝaj kaj bluaj lanaj zonoj, kaj kapvestitaj per la ruĝa Napola

ĉapeto; dekstre, la orkestro konsistanta el du gitarludantoj kaj el du mandolinludantoj; fine, meze, dancantaj paroj da gejunuloj. Jen estas la personoj de la sceno.

La viroj estas junaj, altaj kaj maldikaj; la junulinoj havas ravan vizaĝon enkadrigitan per nigregaj haroj; kaj la okuloj brilas per viveco kaj amo.

Tiun ĉi dancon, tiel volupteman kaj tiel ĉarman, kiu estas nur senĉesa turniĝado, intermiksita je plaĉaj teniĝoj kaj je amemaj mimiklingvoj, ili plenumas je la akordoj de vigla kaj kurioza muziko, kiun la gedancantoj akompanas, la viro per kastagnetoj, kaj la junulino per la mallaŭtaj kaj ripetitaj sonoj de l' tambureto.

Jen estas la Napola Tarantela danco.

Grafo ALBERT GALLOIS.

ARTISTA KAI LITERATURA VIVADO.

Ni daŭras konatigi, en tiu literatura kaj artista fako, diverslandajn eminentulojn, pentritajn de sampatrujanoj aŭ samlingvanoj.

Oni ne forĝesis la interesajn liniojn verkitajn por « Tra la Mondo », pri Siler', de Pr. Christaller, nia agema germana samideano. Hodiaŭ ni havas la plezuron enpresi alian artikolon pri fama germanlingva verkisto, kiu kvankam dubanta iom pri la estonto de nia afero, tamen afable sendis sian portreton kun subskribo por nia revuo, kiel estimat-esto por Esperanto.

Aliparte du Skotoj bonvolis verki kelkajn liniojn pri la fama skota filozofo G. Buchanan, kaj la festoj ĵus okazintaj por lin glorigi.

ALDONO: Pri la fama holanda pentristo, ĵus solenita de l' Holanda nacio, bonvolis paroli la distinginda artkritikisto Eŭjeno Montrosier.

Fine, de Frederiko Mistral, la genia aŭtoro de Mireille tutmonda fama, ni donas belan portreton kun kelkaj linioj pri lia nova verko « Memorskriboj kaj Rakontoj » ĵus eliranta.

T. L. M.

Petro Rosegger.

Unu el la plej legataj kaj ankaŭ plej amindaj verkistoj germanlingvaj nuntempe estas Petro Rosegger. Li naskiĝis la 31^{an} de Julio 1843 en Alpl apud Kriglah en la aŭstruja provinco Stejermark. Li pasigis sian junecon en malriĉa medio, kiu tamen ne povis malhelpi riĉan disvolviĝon de lia interna vivado. La piema hejmo kaj la montega ĉirkaŭaĵo influegis lian infanan ecaron. Estante tro malfortika por terkultura laborado, li devis fariĝi tajloro. Kaj li kudris kun lia majstro jen tie, jen tie ĉi en la domoj, tiele ekkonante ĉiaspecajn homojn. Malgrandaj versaĵoj tiam de li verkitaj, venis sen lia scio en gazeton de la provinca ĉefurbo Grac'. Per tio li gajnis favorantojn, kiuj al li ebligis plian kleriĝon en la tiea komerca akademio. Kaj tiam li dediĉis sin al la poezio. Per vojaĝoj, li ekkonis ankaŭ l' eksterlandon, sed tamen la kampo de lia poeta laborado estadis liaj montaranoj, kies advokato esti li celas, kaj kiujn li skribe pentras je ĉiuj flankoj, serĉante ilin komprenigi de la legantoj. Al tio lin helpas lia verema, amoplena kaj pia sentado, kiu jam montriĝas per la surskribo sur la pordo de lia modesta kampodomo en Kriglah :

« Treu unser Herz, wahr unser Wort,
Deutsch unser Lied, Gott unser Hort ! »

(troj unzer here, war' unzer vort, deŭĉ unzer lid', Got' unzer hort=fidela (estu) nia kor', vera nia vort', hejmama nia kant', Dio nia rok'!) Tiu ĉi homamo, loĝanta en li kaj travarmiganta liajn verkojn, ankaŭ la bonhumoro ĉie aperanta, certe kaŭzis la plaĉon, kiun trovis la multaj rakontetoj aŭ rakontoj pri la Alpoj. Pli ol kvardek libroj portas lian nomon kaj certe apenaŭ ekzistas Germana vilaĝeto, kie oni ne trovas unu el ili.

Li mem diras pri sia verkado : « Jam de longe ĉe mia literatura laborado, mi ne celas alion ol kontentigi mian naturan emegon, prezenti kiel eble plej vere kaj klare ĉion, kio vivas en mia kor', kaj tiel reeldoni la mondon, kiu venis per sentoj kaj sperto de ekstere internen, kaj tie densiĝis kaj klariĝis. »

Ĉar Rosegger estas homo religiema, kaj ĉar li sbribas per sia koro, li ne povas esti nur rakontanto aŭ amuziganto, li nepre devas esti edukanto kaj informanto. Per lia antaŭ ses jaroj elirinta libro « Mein Himmelreich » (Mejn himelreĉj = mia ĉiela hejmo) ni ekkonas ankaŭ la religiajn sentojn de l' poeto. Estante katoliko laŭ sia juneca medio, li gajnis pli liberan kaj pli altan religian ŝtupon per konatiĝo pri aliaj pririgardoj kaj precipe per atenta legado de l' evangelio. Li tamen ne eliris el la katolika eklezio, kiel faris multaj el liaj samlandanoj en la nuna « Los-von-Rom-Bewegung » (for de Rom-a movado) ĉar lia pieteca sento ne povas rompi je ĉio, kio estis tiel multe ŝatita de liaj gepatroj, lia poeta animo ankaŭ trovas multon allogantan ĉe la katolika religiado. Jen lia konsilo por tiuj, kiujn nescias kion fari je religiaj aferoj. « Al kiu do fariĝis neŝatata la eklezio, kiu perdis konfidon al ĝi kaj tamen deziras esti konfesanto de kristanismo, tiu sincere dediĉu sin por io alia, kiu animumas kaj nobligas lin, ĉu la protestantismo severe kaj entuziasme direktata al evangelio, ĉu la « Altkatolikismo » (malnovkatolikismo) staranta inter tiu kaj la roma eklezio, kaj ĉu la nur spiritema kristanismo — tiom pli bone. » Sur la lasta ĉi ŝtupo staras Rosegger, kaj tie sufiĉe indiferenta estas en kia religia societo oni sin trovas.

Ĉiu vere religia homo devas emi je homaraj idealoj; tial Rosegger kredas, pri pacifismo, ke venos mondpaco, li diras : « Estas konsciencia devo voli, serĉi kaj esperi la pacon. » Je mia demando pri Esperanto, li skribis al mi : « Sinceran bondeziron por tia mondlingvo, kiu principe estas dezireginda, sed malfacile enkondukebla. » Pripensu ni ke la poeto, dum vintro vivadas en Grac', kie ekzistas la lasta kastelo de l' pereinta Volapük, kaj kien verŝajne Esperanto duoble malfacile eniros, tiam ni komprenas lian provizoran nekredon pri sukceso de nia celado, sed certe lia idealemo lin igos Esperantista kaj akceliganta ankaŭ en tiu ĉi rilato.

P. CHRISTALLER.
El Stuttgart.

La kvarcentjara festo de George Buchanan'.

Vendredon kaj sabaton, la sesan kaj sepan de Julio en St. Andrews, oni festis la kvarcentjaran naskiĝtagon de George Buchanan' (elparolu, Ĝorg Buchanan').

Neniu loko pli decas por la festado ol la antikva Universitato de St. Andrews, en kiu li okupis la ĉefan lokon dum kvar jaroj de sia vivo.

La festoj komencis per Dia servo en la universitata preĝejo, partoprenita de ĉirkaŭ tri cent personoj. Posttagmeze, kompanio el notindaj personoj kunvenis en la ĉambregon da la Universitato, kie multaj honorindaj personoj ricevis honorigajn titolojn ; kaj Lord Reay (Baron Mackay de Ophemest, Holando) faris paroladegon pri Buchanan'.

Doktoro Andrew Carnegie, ĉefrektoro de la Universitato, prezidis ; kaj ĉeestis la plimulto el la profesoroj, kaj multe da urbestroj de Skotlando ; profesoro Bonet-Mausy kaj Salles, Parizo ; profesoro Hume Brown, Edinburgo ; Sheriff Johnstone, reprezentanta la Societon de advokatoj ; S-ro J. Maitland Thomson, reprezentanta la antikvistojn, kaj ceteraj. Vespere, granda kompanio vespermanĝis en la manĝsalono de la Universitato.

Sabaton matene, la festantoj vizitis la universitatan bibliotekon, kie la libraro, S-ro J. Maitland Anderson, faris kolekton de la verkoj de Buchanan. La posttagmezon oni festis per ĝardenfesto, kie Estro kaj S-ino Donaldson, St. Andrews Universitato, ricevis la gastejn.

J. T. HAXTON
el St Andrews.

George Buchanan'.

George Buchanan', tria filo de Thomas Buchanan' kaj Agnes Heriot, naskiĝis dum Februaro 1506^a, en la paroĥo Killearn, graflando Stirling', Skotlando, kie li ricevis sian fundamentan edukadon. Poste li studadis en la Universitato de Parizo, kie li akiris grandan reputacion pro eleganta Latina versfarado, dum sia libertempo. La rilatoj inter George Buchanan' kaj la kleruloj de Francujo kaj Portugalujo estis ambaŭ intimaj kaj interesaj, sed manko de spaco malpermesas ke ni presigu detalojn. Tamen, almenaŭ, ni devas sciigi ke Montaigne estis unu el liaj studentoj, kiam li estis profesoro de la Latina lingvo (Angle : « Humanity ») en la Kolegio Guienne, Bordeaux, kaj ke la plimaljuna Scaliger (Scaliger patro) estis lia speciale amiko, dum la plijuna Scaliger (Scaliger filo), tiam knabo, admiris Buchanan' inter la gastej de sia patro kaj poste konstatis, ke li superas ĉiujn Latinajn poetojn de tiu epoko.

Buchanan' estis la aŭtoro de multaj verkoj, inter aliaj la *Somnium*, *Palidonia* kaj *Franciscanus* (satiraj atakoj kontraŭ la tiamaj makuloj rilate al la « Franciscan » (grupo monaha) ; la *Jephthes* kaj *Baptistes* (originalaj tragedioj) ; la vere rimarkinda traduko de la *Psalmoj de Davido* el la Hebra en la Latinan lingvon ; kaj, super ĉio, lia ĉefverko, la monumenta *History of Scotland* (Historio de Skotlando).

Ĉiuj tiuj ĉi verkoj estas en la Latina lingvo, sed Buchanan' ankaŭ posedis egalan majstrecon de sia nacia lingvo kaj, ĝin uzante, skribis laŭ forta, klara kaj vira stilo.

Dum la lastaj dekkvin jaroj de sia vivo, li partoprenis ageme en la politikaj aferoj de Skotlando kaj sin montris kompetenta administranto. En la jaro 1570, li fariĝis gubernisto de la reĝido James, filo de la fama reĝino Mary, kaj kapable kontrolis sian reĝan lernanton sen timo aŭ favoro. Ĉirkaŭ unu monato post la eliro de sia granda Historio, li mortis en Edinburgh, la 28^{an} de Septembro 1582, dum la sepdek sepa jaro de sia longa kaj utila vivo. Entute, George Buchanan' estas en la unua vico de la Skotaj literaturistoj kaj meritas konsideradon kiel unu el tiuj Eŭropaj estroj de la pensado, kies agado helpadis senteble pri la farado de la moderna mondo.

Resumo de artikolo de THOMAS BAYNE,
Skota literaturisto de Glasgow.
(Esperantigis Esperantisto 8820).
El Glasgow.



Petro Rosegger

Davido el la Hebra en la Latinan lingvon ; kaj, super ĉio, lia ĉefverko, la monumenta *History of Scotland* (Historio de Skotlando).





LA PATRO DE REMBRANDT.

LA FILO DE REMBRANDT.

LA PATRINO DE REMBRANDT.

Rembrandt.

Holandujo festas. Ĝi solenigas la tricentan datrevon de la naskiĝo de unu el siaj plej famaj idoj: pentristo Rembrandt.

De tri centjaroj, la vivado, la laboroj de l'artisto kaj ĉiuj karakterizaĵoj, kiuj povas klarigi l'unu, ĵeti ian lumon al la aliaj, liveris ŝtufon por centoj da volumoj, ne okazigante iam la akordon de l' tre apartigitaj opinioj.

Rembrandt estas geniulo, unu el tiuj fortoj de la naturo, kiuj imponas tiam, kiam, tre ofte, oni ne povas sufiĉe klarigi la kialon de tia superrego.

Li estas l'aŭtoro de cent ĉefverkoj. Li subskribis *La leciono pri Anatomio*; *la Drapistaj sindikoj*; *la nokta Rondiro*; *Jesuo meze de l' Doktoroj*; intimaj scenojn; religiajn pentraĵojn; kelkajn pejzaĝojn; kaj portretojn el kiuj: la liaj; Saskia; tiuj de l' sindiko Sixte (elp. Sikst) kaj de lia edzino videblaj en la domo Sixte ĉe Amsterdam, atestas la plej rimarkindan komprenon de l' homaro, kiun neniu pentristo antaŭ kaj post li estas iam montrinta.

Oni scias kiom da mankoj, da nekonataj eroj enhavas la vivo de Rembrandt; kiom ĝi estis necerta en liaj komencoj, malfacila dum la jaroj sekvintaj. La mistero kaj ombro ŝajnas enkovri la vivdisvolviĝon de l' pentristo; la solejo ĉiam de li serĉita, faras el li kvazaŭ abstraktulo, ia kolorila alhemisto.

Rilate la pentraĵojn, kies titolojn mi memorigas ĉi supre: *Anatomia leciono* kaj *Drapistaj sindikoj* li eliras el la mallumeco de sia pentrejo por penike priskribi, ĉe tiuj scienculoj aŭ ĉe tiuj Malaltaj — Landaj burĝoj, karakterojn plenajn je homeco kaj civila kuraĝeco. En la *nokta Rondiro*, kiu okazigis tiom da disputadoj, la genio de l'artisto estas malpli senmanka ol en la antaŭaj temoj. Li estis devigata reprezenti difinitan aron el siaj samurbanoj, kiuj ĉiuj, kompreneble, postulis flate pentriĝi. Kvazaŭa devigo pri hierarĥio lin devigis loki ilin iom

hazarde kaj ilin miksigi en enigman scenon, kies solvo, post tri centjaroj, ne estas trovita.

Oni devas ĝin diri — kaj tia konstato deprenas nenion el la gloro de Rembrandt — por la ampleksaj ornamaj arangverkoj, por la enluma metado de l' korporacioj, el kiuj konsistis la forto kaj la ĝojo de Holandujo dum la XV^a centjaro, iu Van der Helts aŭ iu Hals lin superas.

Sed, kie Rembrandt estas senegala, kie li kaptas ne sole la okulojn sed ankaŭ la penson de tiu, kiu lin rigardas, estas en iuj el siaj pentratoloj (aŭ *simple* toloj), preskaŭ timindaj per iliaj ampleksoj, preskaŭ diskretaj per la temoj traktitaj, kaj en kiuj brilegas la magio de lia procedo. Li sidigas ĉirkaŭ tablo kampa kaj mallerte kvadratigita kelkajn maldelikatulojn, antaŭ ili nekonatulon envolvitan per kvazaŭa ronda lumajo, kaj tuj la sceno pli grandigas, la mistero klariĝas: ia supernatura majesteco envolas la kadron kaj la personojn; kaj la majstro verkas ĉefverkon: *la Aliĝintojn d' Emmaüs*, de nia muzeo Louvre.

Tiu artikoleto ne pretendas esti kritika artikolo pri Rembrandt. Estus necesa plena volumo por resumi ĉion formantan la verkon de l' majstro.

Oni devus preparoli kaj liajn historiajn temojn, kaj ĉiujn liajn portretojn tiel rimarkindajn, kaj liajn intimajojn tiel allogajn, liajn mistikajn tolojn, kaj liajn admirindajn peracidagravurojn, kies ŝatindegajn specimenojn posedas la kolekto Dutuit.

«Tra la Mondo», kiu ĉien iras por disvastigi la bonan parolon pri Esperanto, kiu havas kunlaborantojn en Okcidento kaj Oriento, en Afriko kiel en Azio, volas ke, tra la senfinaj spacoj de nia planeto, ĉio, kio interesas la kuriozecon, ĉio kio pasiigas la spiriton, ĉio kio enflamigas la homan inteligenton estu portata al la kvar partoj de tiu ĉielo, kiu kovras tiom da diversaj pensmanieroj, kaj tiu deziro kaŭzis tiun noticon.

EŬJENO MONTROSIER.

REMBRANDT



LA «NOKTA RONDIRO» (1642)

(Muzeo d' Amsterdam)



LA LEZIONE PRI ANATOMIO DE PROFESORO TULP

(Museo de La Haya.)



Kl. « Les Annales

LA GLORA AŬTORO JE SIA SKRIBOTABLO.

Politiques et Littéraires. »

Frederiko Mistral'.

Frederiko Mistral estas unu el la plej belaj kaj citindaj ekzemploj de amo al la naskiĝaj lando kaj lingvo. Per admirindaj verkoj, tiaj kiaj « Calendal », kaj « Mirceille » kies duavoĉa kanto estas tutmonde konata de l' gemuzikistoj, li revivigis la maljunan kaj belsonan Provencan lingvon; per la kreado de l'muzeo arlatena li starigis malavare templon al sia amata lando, kolektante ĉion kapablan ĝin ŝatigi kaj admirigi.

Sajnas ke tiaj laboroj, kiuj meritigis al li la literaturan nobelan premion en 1904, povis kontentigi lin. Tamen tio ŝajnis al li nesufiĉa, kaj li entreprenis priskribi per la prozo, la landon, kiun li kantis tiel elokvente per la poezio.

Ĉio kio formas la personiĝaĵon de raso, la postvivado de ĝia pasintaĵo, la komunio de l' homoj sub la sama ĉielo, en la samaj amoj, la samaj malamoj, Mistral tion esprimis en

la longa sekvo de lumaj vidaĵoj, kies pentraĵoj enkadrigas la ĉarmajn scenojn de lia vivo, kiujn li montras al ni en « Mémoires et Souvenirs » memorskriboj kaj rakontoj.

Enpresante tiun delikatan verkon, « Les Annales Politiques et Littéraires » la revuo tutmonde konata en la ĉiulandaj intelektaj mezoj, kie la franca lingvo estas kulturata, pruvis unu fojon plie kun kia zorgo kaj gusto ĝi estas direktata.

Ni donos en nia proksima numero eliraĵon de tiu verko, kies multaj tradukoj estas jam petitaj; hodiaŭ ni volis prezenti al nia legantaro la belan fizionomion de tiu nobla amanto de la Patrujo.

A. M.

Ankaŭ el tiu bela kaj artista revuo ni elĉerpis la rimarkindajn ilustraĵojn, kiuj akompanas nian artikolon pri Rembrandt.

Nova literatura verko.

Don Juan aŭ la *Stona festeno*, kvinakta komedio de Molière (Moljero), majstre tradukita de l' distinginda rektoro de la Dijona Universitato, Sinjoro Emile Boirac.

Ne estas necese rekomendi tiun ĉi verkon al niaj gelegantoj: la bonkonateco de l' nomo de l' eminente talenta tradukinto sufiĉas ja por varmege instigi, ke ili havu en sia biblioteko tiun bonmodelan libron. Ne sole ĉiuj geesperantistoj devas ĝin legi por penadi imiti tiun stilon klaran, agrablan, naturan, simplan kaj elegantan kiu karakterizas la verkojn de nia eminenta samideano, sed ankaŭ ili devas diskonigi ĝin ĉirkaŭ si; ĉar tiu ĉefverko estas bonega armilo por pruvi la neneigeblan

literaturan valoron de nia kara lingvo. Efektive, kiuj povas kompari la tradukon kun la originalo, tiuj vidas ke estas mirige fidela reprodukto de l' genio de nia glora Molière. Tial, ni ŝuldas varmajn dankojn al la lertega tradukinto, kiu faris grandan servon al nia literaturo pliriĉigante ĝin per tiu vere rimarkinda verko. La tralegado de *Don Juan* estas potence interesa. Ĝi montras ke frue-malfrue estas terure punata la delogisto nenion kredanta, kies vivado estas farita el hipokriteco kaj malvirtoj. (1 fr. 50 ĉe Librairie Hachette et Cie, 79, Bd St Germain, Paris).

ROKSANO.



Blanka Cemento.



FAŬNO.

La aldonitaj ilustraĵoj provas la multflankan praktikan uzadon de l' blanka cemento. La statuo pri kiu mi parolas ĉi sube montras, aliparte, ke blanka cemento estas metita je l' servo de Esperanto.

La Statuo de la Esperantistino.


Kun plezuro ni konstatas, ke talenta artisto, S^o Fr. Schafenbühl, solvis la problemon, ŝtone enkorpiĝi la komunan utilan idealon de tutmonda helplingvo per la arto de l' multkolora plastiko. Rigardante la verkon, kiu eble estas la plej bela surprizo por la kongresanoj en Genevo, ni vidas la « Esperantistinon », virina figuraĵo en delikata verda nuanco, kiel simbolo de la mondlingvo, genueflekse sur blua kuglo. La artisto rajte elektis tiun ĉi pozicion, per kiu li propramane kaj sendepende forlasis la tradician « flugpendan ». La divido de l' figuroj estas tre originala kaj impresema. Ĉirkaŭ la blua kuglo grupiĝas kvin blankaj figuraĵetoj: simboloj de la kvin mondpartoj, en riĉa variacio, ĉiu en alia sintenado kaj alia faro. Plue ni trovas, kiel bonega simboligo, la telefonon, ĉar per tiu ilo, la artisto celas evidentiĝi la ideon, ke per la helplingvo tutmonda « Esperanto » estas eble interrilatiĝi kun ĉiuj nacioj de l' Universo. « Esperantistino » estas reprezentata parolante, kio estas tre logika momento, dum la dekstra mano, tenanta la telefotubon, kuŝas sur la genuo, preta ricevi la respondon. Eĉ la figuraĵetoj estas tre bone rekoneblaj en sia rasa diferenco. Ĉe la piedoj de l' Esperantistino staras la simbolo de Eŭropo, kiel lulilo de la tutmonda lingvo, publikiganta per fanfaro laŭtempan novaĵon.

En vera ĝojo pri la bela verko ni sincere kaj plenaryte povas diri, ke la artisto mirinde solvis sian taskon kaj trovis la plej bonan manieron esprimi artistan ideon; klare kaj bonkompreneble la arta grupo sin prezentas al la rigardanto kaj honoras ĉe ĉiuj kongresanoj kaj ĉe la tuta Esperantistaro la artiston, kiu estimis la ideon plene indan, esti senmorteble simboligita per ŝtonaĵo. La tuto kiel multkolora plastikaĵo estas pure originala arta kreaĵo, ĉu en kompozicio, ĉu en koloro kaj materialo, kaj estas certe sola en sia speco sur la tuta teritorio de la plastiko. Se ni havus la feliĉon vidi la labormanieron de la tre juna artisto kaj la liberecon de lia arta kreado ni certe vidus en li ekestantan genion. Ni nur deziras, ke la statuo trovi sian indan lokon, ne nur dum la kongreso, sen ankaŭ poste por ĉiam. Certe la sakriĉo ne estus tro granda akiri ĝin kiel memoro de la Svislanda Kongreso kaj tiamaniere konservi ĝin al la Esperantistaro.

FR. SCHNEEBERGER.



RELIEFETAĴO.



Kopirajto

ĜENERALA VIDAĴO DE WISBY'O.

Sta Drotten; Sta Laurentius; meze, Sta Spirit-preĝejo; plej dekstre, Sta Klementius.

La Ruinoj de Wisby.

Originale verkita kaj ilustrita de P. HEDSTROM (Svedujo).

Meze de l' Balta Maro troviĝas insulo *Gotland'o* kaj sur la okcidenta marbordo de tiu ĉi insulo, kuŝas urbo Wisby, kiu de la jaro 1645^a estas kuniĝita kun la Sveda regno.

Se vaporŝipe oni alproksimiĝas la urbon, oni ĝin ekvidas amfiteatre lokitan sur deklivo de la Maro: pro siaj multenombraj ruinoj kaj Mezepokaj konstruaĵoj, ĝi vidiĝas kiel viva pentraĵo el la pasinta tempo; sed sen tia malgaja signo de ruiniĝo, kia estas tiel kutima por ruinurboj. Ĉar, eĉ kvankam la malnova rondmurego kaj multaj ruinoj de preĝejoj kaj fortikaĵoj pleje vidiĝas antaŭ la rigardanto, tamen, la vidiĝo dolĉiĝas per agrabla verdaĵo kaj komfortaj loĝdomoj.

La supra parto de l' urbo kuŝas sur montorando, de kie ŝtuparaj kaj krutaj stratoj kondukas al la malsupra, pli granda, urbparto. La stratoj estas malrektaj kaj mallarĝaj, kaj la bazaroj malgrandaj. En la norda duono de l' urbo estas sendomaj eben-aĵoj, kiuj nun aliformiĝis je ombrohavaj parkoj, kaj plaĉaj promenejoj: tre granda estas la «Botanika ĝardeno», kaj ĝi meritas atenton pro sia multspeca aro da sudkreskaĵoj, spite nordeco; vizitinda estas ankaŭ «Argentĉapetaparko»: tiel

nomata, ĉar, laŭ legendo, la tegmento de apuda turo iam estis el arĝento.

Nuntempa *Wisby* estas ankaŭ rimarkinda, tial ke troviĝas neniu alia Sveda urbo de Mezepoko, kiu kiel ĝi, de fama komercurbo malaltiĝis ĝis kompare sengrava malgranda urbo, enhavanta nur ĉirkaŭe 7000 loĝantojn. Pro tio estas dirite ke *Wisby* posedas nur *unu* grandecon — de l' memoro, kaj nur *unu* grandiozecon — de l' ruinoj.

La «florreĝo» *Linné* iam (1741) priskribis la lokon, kie laŭ legendo foje loĝis la «reĝino de l' maro»; li skribis: «tiu ĉi urbo ŝajnas al ni kvazaŭ alia *Romo*, pro la tiel grandiozaj preĝejoj sentegmentaj, kiuj staras nun ĉie en la tuta urbo, aliformiĝintaj je ruinoj per la tempo kaj la ŝanĝoj.

Ĝiaj belaj kolonoj kaj strangaj arkajoj, turnas nian penson al la antikva «Flor' de l' loko.»

La tuta urbo estas ĉirkaŭita de murego longa 3,325 metrojn kaj alta ses ĝis naŭ metroj, krom ok (8) tursimilaj plialtiĝoj; la muro estas provizita per 25 firmiteraj turoj 20 metrojn altaj. Antaŭ la jaro 1288^a la muro ne havis la nunan altecon, sed post la dirita jaro, la urbanoj, timante ke ĝi ne estus sufiĉe fortika por ŝirmi ilin kontraŭ militaj

(*) La ligiĝo efektiviĝis inter 80 komercurboj en la jaro 1241^a.


atakoj, surkonstruinte ĝin, plifortikigis ĝin kaj donis al ĝi la formon, kiu ankoraŭ aperas de ĝia eksteraĵo. Kompare konstate ankoraŭ restas tiu ĉi fortikaĵo tiom grava por pasintuloj, kiu de iu estis nomata: « la plej rimarkinda antikvumemoraĵo de l' Nordo ». Laŭ pri kalkuloj de ia antikvisto, la urbo enhavis ne malpli

ol dek ok (18) sanktejoj. Por ĝuste kompreni kial tiom da preĝejoj en tia malmultampleksa urbo, oni devas nur rememorigi, ke Wisby iam apartenadis al la fama « Hansa » ligo (*) kaj dum tiu epoko estis unu inter la plej popolhavaj, potencaj kaj riĉaj urboj de Eŭropo, kaj kies loĝantaro konsistis el ĉiuspecaj naciuloj. Do, Wisby estis vere internacia loko, kie ĉiu nacio havis unu propran preĝejon kaj sia specan Diservon.

Multaj preĝejoj estas nun malaperintaj tiel tute, ke oni eĉ ne povas trovi lokon aŭ fundamenton, kie ili staris; tion agis ne nur fajrdanĝeraj kaj militaj detruoj, sed ankaŭ senzorga vandalismo, kaj mallaŭdinda profitegemo de la pasinttempaj urbanoj domkonstruontaj: Multaj domoj, tute aŭ parte estas konstruitaj per ŝtonoj kaj fragmentoj el sanktejoj; kaj ankoraŭ artkonanto povas, en modesta domo, ekrekoni jen ŝtuparon kun nobla stilo, jen fenestran kadron pentritan, el preĝejo katedra.

Sta Katharinae, kies ruino staras meze de l' urbo, apud « Granda bazaro », estis eble la plej bela. La preĝejo iam apartenis al la potenca Franciskana monaĥordeno; ĝi estas longa je 58 metroj; konstruita (ŝajne proksime post la jaro 1233^a) je la pintarkaja stilo. Ankoraŭ staras ĝiaj malpezaj arkaĵoj subapogitaj de graciaj kolonoj, kiuj certe instigas la rigardanton estimplene ekpensi pri la povo kaj la lerteco de l' estintaj monaĥoj kaj preĝej-arkitekturistoj.

Proksime de la supre dirita bazaro, apud kiu Sta Katharinae levas siajn ŝtonamasojn, oni vidas ambaŭ « gefratpreĝejojn »:



Kopiraĵo.

WISBY'AJ RUINOJ.
Norda parto de l' murego.

gaj galerioj en kelkaj elstarajoj sur la muroj; ion komparindan kun tio ĉi en la tuta Nordo, oni trovas nur en Trondhjem'a ĉefpreĝejo (Norvegujo). Sta Drotten estis konstruita komence de l' 12^a centjaro, je rondarkaja stilo, kun dika kvarflanka 36 metrojn alta turo. Pli norde staranta « Sta Spiritpreĝejo ». Kun Sta Katharinae ĝi konkuras pri belecpremio inter ĉiuj tiuj ĉarmaj memoraĵoj de la Mezepoka arkitekturo.

La Sta Spiritpreĝejo verŝajne estas de la komenco de la 12^a centjaro, kaj rilate je arkitekturo la plej stranga inter ĉiuj Wisby'aj preĝejoj: ĝi estas 25 metrojn longa okflanka konstruaĵo en rondarka stilo, havas du etaĝojn kunligitajn per ŝtuparoj, kaj komunan ĥorejon. La tuto estas kuriozaĵo je la konstruirilato. Ankoraŭ pli norde ni vidas Stan Klementius, konstruitan dum la unua duono de l' 12^a centjaro, longa je 43 metroj. De tiu preĝejo, kiu estis dediĉata al marista ŝirmsanktulo Sanktus Klementius, restas nur la ekstermuroj. Sta Nicolaŭs kuŝas plej norde el ĉiuj, en interno de l' urbo, kaj estis iam la plej grava el la Wisby'aj preĝejoj.


La konstruaĵo montras ne nur rondarkajan sed ankaŭ pintarkajan stilon: tio kredeble pro malsamaj konstruiĝtempoj; laŭ supozoj ĝi stariĝis dum tempo inter la jaroj 1220^a kaj 1243^a; tamen la ĥorejo ne pli frue ol proksimume la jaro 1400^a. Pro sia nuna stato la preĝejo estas bela kaj imponiga ruino, kun pli ol 60 metroj je longo kaj kelkaj jam restantaj arkaĵoj.

(Daŭranta).

P. HEDSTROM,
el Rossön (Svedujo).

Kopiraĵo.

WISBY'AJ RUINOJ.
Interno de Sta Katharina.



Fot. Slater.

LA GLAVDANCO PER LA GORDON HIGHLANDERS ORFOJ.

La Skotlanda Glavdanco.

Verkita kaj Ilustrita de C. SLATER (Anglujo).

Dum la kongresa ekskurso en Dover'o (Aŭgusto 1905) Doktoro Zamenhof kun sia edzino kaj kelkaj personoj ĉeestis en «Connaught Park» la faman skotan glavdancan, dancatan de junaj Gordon'aj orfoj.

S^r C. Slater (Anglujo) afable sendis al ni la jenajn ilustraĵojn, plenigitajn de kelkaj detaloj pri la danco, kiujn li petis kaj ricevis de Skotaj soldatoj. Eble tiu memoro de nia unua universala kongreso interesos niajn legantojn, je la momento kiam malfermiĝas la dua.

La Glavdanco estas komuna en multe da landoj sub diversaj formoj. Tiu prezentita sur la fotograf-
aĵoj estas la Nordskotlanda Glavdanco. Je l' deveno ĝi estis dancata sur la batalkampo de la soldatoj, antaŭ ol batali; kaj la krioj dum la danco estis uzataj por eksciti la malfortiĝantan kuraĝon de la batalantoj. (La Glavdanco mem devenas de la Pyrrhica Saltatio de la Romanoj, kiu estis la milita danco de iliaj Salii aŭ Pastroj de Mars (planedo); sed eble ĝi devenis de la antikvaj Grekoj). Ĝi estas praktikata de tre longa tempe de la Nordskotlandaj Highlanders (Altlandanoj) sub la nomo Killi Kallum. En la malnova danco, la dancantoj faris evoluciojn de atako kaj defendo; sed, la ĉefa arto de la nuna danco estas la lerteco de la viroj, dancantaj super du aŭ kvar glavoj krucigitaj aŭ metitaj pinto kontraŭ sur la teron.

Kvar knaboj staras sur unu kruro, kun la manoj sur la koksoj, kontraŭ sia propra glavtenilo.

Je la ĝusta tempo de la muziko ludata sur la «Bagpipes» (Tubsako), de la «Piper» (Tubludanto), ili ekdancas super kaj inter la glavoj, levante siajn

piedojn alten super la tero, samtempe svingetante sian ĉapon super sia kapo, intertuŝante la manojn, saltante alterne per unu kaj l' alia kruro, ne tuŝante la glavojn, kaj rondirante, dum la muziko pl
kaj pli rapidas, kaj ke batalaj krioj estas aŭdigataj.

Subite, post fina pli-rapidigo, la muziko ĉesas, la dancantoj prenas sian glavon sur la herbo kaj ĝin reenmetas en la ingon, je sia flanko.

La lerteco montrata de la Skotaj glavdancanto estas mirinda, kaj nur tre malofte ili tuŝas la glavojn.

Jen estas kelkaj naciaj Skotaj nomoj de vestoj: Ĉapo signifas «Bonnet»; Mantelo kun buko sur la ŝultro estas la «Plaid» (Elparolu Pled);

Jako estas la «Tunic» (Elp. Ĉunik);

Basko havas nomon, «Kilt»;

Fine la pendajo kun la longaj nigraj kaj blankaj haroj estas poŝo kun monujo kaj nomiĝas «Sporran».


C. SLATER,

Hon. Sek. de Openshawa Grupo,
Anglujo.



DOKTORO ZAMENHOF, EN CONNAUGHT PARK, DOVER, RIGARDAS LA DANCON (11 VIII. 05).





Sadag, Ĝenevo.

ĜENEVO KAJ BLANKA MONTO.

Gvidlibreto de la Kongresano.

Verkita de H. HODLER (Ĝenevo).

Okaze de la II^o Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo, ni pensis ke utilos al la kongresantoj havi kelkajn praktikajn sciigojn por viziti la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn. Ĉar ne ekzistos speciala gvidlibro, tiuj ĉi notoj sendube servos al la vizitanto kaj permesos al ĝi konatiĝi kun Ĝenevo dum la liberaj momentoj, kiujn lasos la Kongresa programo.

Ni dividis la vizitindaĵojn laŭ la ses tagoj de la Kongresa semajno, tiel ke ĉiu kongresano povos ilin vidi sen peno, dum la nelaboraj horoj. Tiu ĉi numero de « Tra la Mondo » devas do nepre troviĝi en ĉiuj manoj de la kongresantoj; ĝi ankaŭ estos agrabla rememoro pri la tagoj pasintaj en Ĝenevo kun niaj ĉiulandaj samideanoj.

H. HODLER.

TRA LA URBO ĜENEVO.

Historiaj notetoj. — Ĝenevo estis unue Romana urbeto, pri kiu parolas J. Ĉesar en siaj komentarioj. Poste, dum la V^a jarcento ĝi fariĝis episkopa urbo kaj, en 1032, imperia urbo. De tiu tempo, ĝi subtenis longajn militadojn kontraŭ la Savojaj dukoj ĝin ĉirkaŭantaj; ĝi alligiĝis kun la Svisoj kaj sukcesis certigi sian memstarecon. En 1535, la Respubliko Ĝeneva akceptis la Reformon, kaj en 1536 Kalvin' enloĝiĝis en la urbon, kiu, sub lia severa aŭtoritato, fariĝis la ĉefurbo de l' Protestantara mondo, kaj la rifugejo de la religiaj persekutitoj. Dum la XVIII^a jarcento, okazis longaj bataladoj inter la aristokratio estrara kaj la burĝaro; en 1798 Ĝenevo estis anigita al Franclando ĝis 1814; en tiu epoko la urbo reliberiĝis kaj memvole aliĝis al Svisa Konfederacio, kiel 22^a kantono.

La Ĝeneva kantono kalkulas 142.000 loĝantojn, kies 113.000 apartenas al la urbo. Protestantoj kaj katolikoj estas en egalaj nombroj.


Unua TAGO.

(Mardo 28^a de Aŭgusto 1906).

(PROGRAMO: Victoria Hall. 8 h. 1/2 Malferma Ceremonio de la Kongreso).

Ekforirante del' *Kongresa Oficejo* (15 Quai de l'Île)

en Rodana insulo, ĉe la bordo de l' maldekstra brako de la rivero, oni unue renkontas la « Turon de l' Insulo » (*Tour de l'Île*), malnova restaĵo de episkopa Ĝenevo, antaŭ kiu estis ekzekutata la ĝenevana patrioto Philibert Berthelier. Poste la vizitanto pasos sur la Ponto de l' Insulo, Placo *Bel-Air*, kaj la strato *Corraterie*, kiun li sekvos ĝis la *Place-Neuve*, la plej bela placo en Ĝenevo. Maldekstre staras la altaj terasoj de la malnova urbo kun belaj privataj domoj; dekstre la Muzeo *Rath* kaj la *Granda*



UNIVERSITATO-KUNVENEJO DE LA KONGRESANOJ.

Teatro, moderna konstruaĵo laŭ la modelo de l' Pariza « Operejo ».

Riĉe ornamita interno, duobla ŝtuparo, luksa

aranĝo igas ĝin la plej bela teatro en Svislando. (Por viziti, sin turni al la pordisto)—Ĉe la tria flanko de la placo troviĝas la *Muzika Konservatorio*, fondita de S^{ro} Bartholoni. Ĝi estas la plej granda kaj plej bona muziklernejo en Svislando. Poste, kontraŭ la ebena *Plainpalais*, estas la *Preĝejo de l'Sankta-Koro*. Meze de la Place-Neuve staras la statuo de *Generalo Dufour*, la paciginto de Svislando en 1847. Fine, ĉe la sud-okcidento, la bela enirejo al la Promenejo *Bastions*; interne estas kiosko, kie okazas senpagaj koncertoj, posttagmeze aŭ vespere.

Dekstre, la Universitato; la du flankaj konstruaĵoj enhavas la Publikan Bibliotekon kaj muzeojn. En la Universitato troviĝas *l'Aula*, en kiu okazos la kongresaj kunvenoj dum la 29^a, 31^a de Aŭgusto kaj 1^a de Septembro. Krom tio, estas diversaj apartaj ĉambroj por komisioj kaj specialaj kunvenoj. *L'Aula* estas sur la unua etaĝo de la centra konstruaĵo.

La vizitanto poste reiros per la vojeto kondukanta al la statuo de Davido, eliros el la promenejo antaŭ la Palaco de l' Balotoj (*Bâtiment Electoral*) kaj, per la strato Generalo-Dufour, li alvenos al *Victoria-Hall*, belega koncertejo donacita al Urbo Ĝenevo. Tie okazos la malferma kaj ferma ceremonioj de la Kongreso, (28^a de Aŭgusto vespere, 1^a Septembro vespere); la halo, krom vasta parteroj, enhavas du galeriojn, kvar loĝiojn, kaj larĝan podiumon; en ĉiuj lokoj estas movaj seĝoj; oni eniras kaj eliras per centra pordo kaj du flankaj pordoj.

Tre proksime, en la strato Hesse, troviĝas *Banejo* kun plenaj hidrotapiaj aparatoj. Kontraŭ tio, Komerca Lernejo, en kiu estas vizitebla rimarkinda Reliefo de Ĝenevo en 1850.

Dua Tago.

(Merkredo 29^a de Aŭgusto).

(PROGRAMO: Matene, specialaj Kunvenoj, en l'Aula; Tagmeze, ĝenerala Kunveno, en l'Aula; Vespere, Teatra festo, en Casino de Saint-Pierre).


Por la kongresanoj kiuj ne partoprenas al specialaj kunvenoj aŭ koncertoj, ni rekomendas jenan promenadon tra la urbo:

Ekforirante de l' Ŝiphaveno (maldekstra bordo), oni renkontas unue la *Nacian Monumenton*, starigitan por rememorigi la aliĝon de Ĝenevo al Svislando. Flanke, estas la *Angla Ĝardeno*, bela promenejo ĉe l' bordo de l' lago, kun bela fonto kaj kiosko. Bustoj de l' ĝenevanaj pentristoj Calame

kaj Liday Ĝi enhavas ankaŭ, en dometo, la vizitindan *Reliefo de Blanka-Monto*, (senpaga dimanĉe, semajne 50 cent.). Elirinte per la orienta pordo, oni laŭiros la lagbordejon *Eaux-vives*, ĝis la samnoma *Parko*. (Koncertoj ĉiutage, ludoj, k. t. c.).

Poste, la promenanto revenos per la strato Pierre-Fatio ĝis la Cours de Rive (stacio de elektraĵ tramoj) kaj supreniros al la Ebena *Tranchées*, ĝis la *Rusa Preĝejo*, rimarkinda pro kvin orumitaj kupoloj. Flanke, la skvaro Toepffer kun la busto de l' samnoma fama verkisto. Tra la stratoj Bellot kaj S Victor kaj la du pontoj, inter kiuj vidiĝas la *Promenejo du Pin*, oni alvenas al la Promenejo *Saint-Antoine*, el kie oni havas belan vidaĵon de l' lago. Malsupre, la *Kolegio*, fondita de Kalvino en 1559. Ĉe la oriento, la *Observatorio* kaj la *Urba Muzeo de l' Artoj*, nun en konstruiĝo.

Laŭirante la stratojn des Chaudronniers kaj Bourg-de-Four, oni iras en la malnovan urbon. Kontraŭ la *Juĝeja Palaco* (bela XVIII^a jarcenta fronto), longa ŝtuparo kondukas al *Sankt-Petra Preĝejo*, kies konstruado, komencita en la X^a jarcento, estis finita en la XIII^a jarcento, dum la Gota periodo. Multaj bruladoj, aparte en 1430, detruis parton de l' urbo kaj ruinigis Sankt-Petron. En 1530, la preĝejo estis tute riparita, kaj en 1756 oni rekonstruis la grekan pordegon, ĉe la enirejo. Antaŭ kelkaj jaroj, oni refaris la Nordan Turon, diversajn partojn kaj ankaŭ la turpinton. La interno de l' preĝejo estas imponanta kaj severa; oni rimarkos la belajn vitraĵojn de l' horejo, la katedron, la monumenton de Agrippa d'Aubigné, kaj la belegajn orgenojn, (koncertoj lunde, merkrede,



TUROJ DE SANKT-PETRO.

sabate, je 8 1/4 vesp.).

En transepta kapelo, marmora statuo de duko Henri de Rohan, protestanta estro. — El la supro de la turoj, (156 ŝtupoj) oni ĝuas belegan vidaĵon. Tarifo montras la kostojn de l' vizitoj. Senpaga eniro marde, ĵaŭde & sabate, de la 1^a ĝis la 3^a horo, kaj dimanĉe post la diservo (en la aliaj tagoj, eniro 20 cent., por la turoj 50 cent.).

Laŭ la dekstra flanko de la preĝejo, en apuda strateto, estas la *Casino de St-Pierre*, kie kunvenos la kongresanoj, merkredon vespere, por teatra festo. La halo estas sur la 1^a etaĝo kaj enhavas, 800 seĝojn kaj scenejon.

Kapelo « Macchabées », flanke de la preĝejo, nove riparita, estas eleganta specimeno de l' Gota arto; speciala enirejo. Proksime, per la strato Soleil-Levant, oni alvenas al la malnova *Armilejo*

kiu enhavas, ĉe la 1^a etaĝo, la *Historian Muzeon de Genevo* (armiloj, trofeoj, flagoj, k. c.; senpaga dimanĉe kaj ĵaŭde de la 1^a ĝis la 4^a horo; en la aliaj tagoj, 50 cent.).

Kontraŭ la armilejo, estas la *Urba Palaco*, konstruita laŭ Firenza stilo, rimarkinda pro sia pavumita senŝtupa alirejo. Vizitindaĵoj: Ĉambro de la Reĝino (bela portreto de Marie Lekzinska), Ĉambro de Alabama, kie estis akceptata la Arbitra juĝo, kiu solvis la malpacon inter Angllando kaj Unuigitaj Ŝtatoj, post Secesia milito, Ĉambro de l' Ŝtata Konsilantaro, kun XVI^a jarcentaj freskoj.

La promenanto malsupreniros tra la strato kaj promenejo de *La Treille*, el kie oni havas belan vidaĵon de l' sud-okcidento, kaj reiros al la Kongresa Oficejo tra la *Corraterie* kaj la Ponto de l'Insulo.



VIDAĴO DE L' ARIANA PARKO.
(Vizitota de la kongresanoj).

kaŭ konataj fremdulejoj kaj banejoj. Por pliaj detaloj, oni legu la specialajn gvidlibrojn pri Lemana Lago.

Kvara Tago.

(Vendredo, 31^a de Aŭgusto).

(PROGRAMO: Matene, kunvenoj en l'Aula. Tagmeze, akcepto en Parko Thudicum. Vespere, festo).

pere, festo).

Oni iras al Muzeo Ariana per elektraĵoj, per sipoj aŭ per vagonaro.

La *Muzeo Ariana* sidas sur monteto, en vasta parko, je 2 kilometroj de Genevo. Ĝi estas fondita de S^{ro} Revilliod, kiu donacis ĝin al la urbo kun speciala sumo por ĝia konservado. Ĝi enhavas admirindajn kolektojn da pentraĵoj, skulptaĵoj, porcelanoj, armiloj kaj ĉiuspecaj kuriozaĵoj. De l' unua etaĝo, oni havas senkomparan vidaĵon de la lago ĝis Laŭzano, de la Alpoj Savoĵaj kun Blanka-Monto.

En la Parko Ariana troviĝas cerveja parko; la suda parko enhavas nun Botanikan kaj Alpan Ĝardenon, kaj proksime de l' lago, la Herbkolekton Delessert, unu el la plej riĉaj en la mondo.

Post la Ariana Muzeo, la belega Kastelo de Baronino A. de Rothschild — kaj la *Edukejo Thudicum*, konata kolegio, en kiu la kongresanoj estas afable invititaj por teo. Poste, ili vizitos la Parkon « Arian ».

Kvina Tago.

(Sabato, 1^a de Septembro).

(PROGRAMO: Matene, kunvenoj en l'Aula. Vespere, malferma ceremonio en Victoria-Hall).

Dum la liberaj horoj, la Kongresanoj povos fari ĵenan promenadon.

Ekforirante de l' Esperanta Oficejo, oni pasos sur la Ponto de l' Insulo (dekstra brako de l' rivero) kaj laŭiros la bordejojn de Bergues, de *Mont-Blanc* kaj Lemano; el tiu ĉi oni havas vastan vidaĵon de Alpoj Savoĵaj kaj de Blanka-Monto.

Oni pasos antaŭ la *Kurshalo*, somera teatro kun elektitaj spektakloj. Proksime, ŝiphaveno kaj poste la *Digo des Paquis*, belega vidpunkto; sur la kontraŭa digo estas fama *Akva ŝprucfontano*, alta je 90 metroj, kiu funkcias dimanĉe vespere. Daŭrigante laŭ la lagbordejo, la promenanto alvenos al *Parko Mon-Repos* (Mia Ripozejo), donacita al la urbo de S^{ro} Ph. Plantamour. En la domo, muzeo de pentraĵoj; ĉarma parko kun belaj

Tria Tago.

(Ĵaŭdo 30^a de Aŭgusto).

(PROGRAMO: Ŝipveturado sur la lago, festeno en Vevey).


La Kongresanoj havos unu aŭ du specialajn vaporŝipojn.

De la Kongresa Oficejo, oni alvenas al la haveno per la du bordejoj (dekstra aŭ maldekstra brako).

La ŝipo unue laŭiras la svisan bordon, pasas antaŭ *Coppet*, kie estas vizitebla la Kastelo de baronino de Staël, filino de Necker, aŭtorino de diversaj rimarkindaj verkoj en la fino de l' XVIII^a jarcento; Nyon, valda urbeto kun pentrinda kastelo: *Prangins*, malnova propraĵo de princo Napoleono; *Morges*, urbeto, proksime de abiaj arbaroj, kiuj superregas la tutan flankon de l' ĵura monto; *Ouchy*, haveno de Laŭzano, al kiu oni alvenas per tramo aŭ monta veturilo. De Ouchy ĝis Vevey, la ŝipo laŭiras la bordon nome Lavaux, kies riĉeco konsistas el vinberejoj kaj alvenas al *Vevey*, urbo de 15.000 loĝantoj, en ĉarma situacio kun bela lagbordejo, el kiu oni havas belegan vidaĵon de la Savoĵaj kaj Valezaj Alpoj (Dent d'Oche, Cornettes de Bise, Grammont, Dent du Midi). En tiu urbo, okazos Granda festeno kaj publika akcepto de l' urba estraro.

Post Vevey, sekvas *Clarens-Montreux-Terri-tet*, hotelplenaj urboj, famaj pro sia admirinda sideo, pro la dolĉeco de la klimato, pro la multnombro de la fremduloj, kiuj tie restas printempe kaj aŭtune.

Ĉe la franca bordo de l' lago, *Evian*, *Thonon*, an-



RODO-INSULO ROUSSEAU.

ombraĵoj kaj imponanta vidaĵo de l' Urbo.

Proksime de l' bordejo, en la strato de Voiron, troviĝas *Amerika kapelo* (Emmanuel Church). Revenante laŭ la lago, oni renkontos la *Monumenton de Duko de Brunswick*, kiu donacis sian tutan riĉaĵon al la Urbo. Tiu tombo estas konstruita laŭ la modelo de l' tombo de Scaliger en Verono. Ĝi mirinde sidas, borde de l' lago kaj kontraŭ Alpoj;


el la mezo de ligna plataĵo ĝi elstaras majeste kaj rebrilas en akvaj fontoj ornamitaj de marmoraj himeroj. La Bordejo de Mont-Blanc kondukas al la samnoma ponto, kaj al la ponto des Bergues, ligita per ponteto kun *Insulo Rousseau*. Meze de l' insuleto, bronza statuo de J. J. Rousseau, de Pradier, kaj kiosko. Belegaj ombraĵoj, kiuj formas trankvilan ripozejon meze de l' movplena urbo.

Tra la stratoj Rousseau kaj Cendrier, oni alvenos al la larĝa strato de Mont-Blanc, antaŭ la ĉarma *Angla Freĝejo*.

Poste, la bela *Ĉefa Poŝtejo*. Maldekstre, la busto de l' inĝeniero Favre, dank'al kiu efektiviĝis la traboriĝo de l' Gothard'a tunelo. Ĉe l' supro de la strato, placo Cornavin kun, dekstre, la *Stacidomo* kaj maldekstre la *Freĝejo Notre-Dame*. (Diservo malnov-katolika). En la bulvarado James-Fazy, *Lernejo de l' Industriaj Artoj* ekspozicio ĉiutage vizitebla), *Urba Horlogista Lernejo* kun *Muzeo de la Ornamantoj*. Daŭrigante laŭ la bulvarado, oni renkontos maldekstre la preĝejon *Saint-Gervais*, nove restarigitan. Tre proksime, la *promenejo James-Fazy* kun busto de la samnoma politikulo, kiu donis al Ĝenevo ĝian nunan konstitucion.

Oni trapasas la belegan Ponton de la *Toulouvrinière*, kaj oni vidas dekstre la vastan konstruaĵon de la *Turbinoj*, tre interesa por viziti. Ĝi entenas 20 turbin-ojn kun forto de 4200 vaporĉevaloj, kiu disdonas akvon al ĉiuj urbopartoj. Tra la bulvarado Georges-Favon, oni alvenas al la vasta *Ebena de Plainpalaŝ*; maldekstre la *Universitato* kun l' *Aula*, kunvenojo de la Kongresanoj. Antaŭ la Universitato, busto de Karl Vogt, naturscienculo.

* **



VIDAĴO DE L' SALEVA MONTO.

pojn majestajn kun Blanka-Monto. Kiam la vetero estas bela, oni ekvidas facile ĉiujn pintojn de tiu grandega montaro, kaj ĉe la sunkuŝiĝo, tiu vidaĵo fariĝas elravaĵo, pri kiu oni eterne rememoras.

Oni iras al Salevo piede aŭ per monta tramo. Piede, oni pasas tra Veyrien, Pas-de-l'Échelle, Monnetier kaj suriras malgrandan aŭ grandan Salevon; per la tramo oni foriras aŭ de Étrombieres kaj iras al Mornex, ĉarma vilaĝo, kie restadis Ruskin kaj Richard Wagner, aŭ de Veyrier ĝis Monnetier, kie vizitinda estas la kastelo. De Monnetier, la vojo iras al Treize-Arbres (1200 metroj); bufedo. Tiu ekskurso estas certe plej la farinda kaj sen grandaj elspezoj.

* **

Oni povas ankaŭ iri al *Ferney*, vilaĝo fama pro la restado de Voltaire, kiu konstruigis kastelon, nun viziteblan. Por tio, oni veturas per tramo: stacidomo antaŭ la *Ĉefa Poŝtejo*. De Ferney, la turistoj povos iri al la Faucille kaj de tie al la Dole; tiuj ekskursoj postulas almenaŭ unu tagon.


Por tiuj, kiuj ne povas iri malproksimen, ni konsilas promenadon al Arbaro « *La Bâtie* » kaj la « *Jonction* ». Oni sekvas la bulvardon Saint-Georges kaj alvenas en kvartalon la *Jonction*; ĉarma promenejo sidas laŭ la Rodana rivero. De tie, oni povas supreniri al Arbaro la *Bâtie*, el kie oni vidas la tutan urbon kaj la kuniĝon de Arvo kun Rodano.

Ankaŭ estas farinda la ekskurso al *Chexbres*, per la ŝipeto sur Rodano, inter la belegaj bordŝtonegoj.

* **

La vizitanto povos, se ĝi preferos, iri en la *bordlagajn vilaĝojn*: La Belotte, Bellerive, Corsier (maldekstra bordo) aŭ Bellevue, Versoix, Coppet, (dekstra bordo). Elektraj tramoj, vaporŝipoj aŭ veturiloj kondukas al tiuj stacioj.

H. HODLER (Ĝenevo)
Redaktoro de « *Juna Esperantiŝto* ».



LEMANA LAGO.



GRUPO DE KAMPAJ DEPUTITOJ RUSAJ JE L' ENTREJO DE DUMO.

La Morto de la Regna Dumo.

La krizo, kune materia kaj morala, kiu agitis tiel grave Rusujon, prenis formon pli gravan ankoraŭ.

Post interdisputo pri la kampa demando, dum kiu Dumo lasis stariĝi antaŭ si la demando pri la alvoko al la popolo, la caro subskribis la disigon de Dumo kaj ordonis la kunvokon de nova Dumo por la 5^a de Marto 1907.

La Parlamento, kiu malaperas, estis nur sepdektaga. Ĝi estis pace elektita, kaj oni kredis ĝenerala ke Rusujo, iĝinte ŝiavice parlamenta na-



OFICIALA AFIŜO SURGLUITA SUR LA MUROJN DE L' GRANDAJ RUSAJ URBOJ, JE L' OKAZO DE L' DUMA MALFERMO.

Traduko de l' ĉefa parto de tiu dokumento: « Nikolaj II, imperiestro kaj aŭtokrato de ĉiuj Rusoj, caro de Polujo, granda duko de Finnlando, k. l. p., sciigas ĉiujn siajn fidelajn regatojn, ke li faris tiun kreaĵon por la plej granda bono de Patrujo ».


cio, estis, kiel aliaj nacioj parlamentaj, enironta en vojon je kvieteco kaj progreso.

Ŝajnas al ni interesa enpresita tie ĉi la afiŝon per kiu la caro esprimis sian esperon.


En Eŭropo, la impreso pri la disigo estis malbona. Oni povis juri pri tio per la ĵurnaloj, kaj per la kunsido de la interparlamentara konferenco de Londono, kie la angla ĉefministro ekkriis:

— Dumo mortis.
Vivu Dumo!





STATUO DE LA « ESPERANTISTINO »
DE S^o SCHAFENBÜHL.



Fot. Charnaux Fr. kaj K^o.

VICTORIA-HALO, KONGRESA ĈAMBREGO.

Genevo.

Ĉirkaŭ la Kongreso.

Ĉi apude, ni donas foto-grafajon de la Statuo de Esperantistino, de S^o Schafenbühl, pri kiu estas parolita sur la komerca kaj industria paĝo.

Jen estas la detala programo de l' Kongresaj kunvenoj, festoj, kaj festenoj. (Laŭ *Esperanto-Journal*).

PROGRAMO.

Mardon 28^{an} de Aŭgusto.

8 h. 1/2 vesp. — Victoria-Hall. — Solena malfermo de l' kongreso.

Merkredon 29^{an} de Aŭgusto.

Matene, en Universitato. — Preparaj kunvenoj (komisioj, sekcioj, k. t. p.).
Tagmeze. — Oficiala festmanĝo.
Posttagmeze, en Universitato. — Unua kunveno ĝenerala.
Vespere. — Teatra reprezento.

Ĵaŭdon 30^{an} de Aŭgusto.

Ekskurso sur Lemana lago; — Ricevo en Vevey de la estraro; — Festmanĝo.

Vendredon 31^{an} de Aŭgusto.

Matene, en Universitato. — Dua Kunveno ĝenerala.
Posttagmeze. — Ricevo de la kongresanoj de H. Thudicum, en Châtelen'a parko; — Vizito de la Ariana Muzeo.
Vespere. — Granda balo.

Sabaton 1^{an} de Septembro.

Matene, en Universitato. — Kunveno de la komisioj.
Posttagmeze, en Universitato. — Tria Kunveno ĝenerala.
Vespere, en Victoria-Hall. — Solena fermo de l' kongreso.

KONGRESA GVIDLIBRETO ILUSTRITA.

Ĉar la organiza komitato ne preparis gvidlibron, apartenis al « Tra la Mondo » ĝin oferi al la kongresanoj. Ni povis efektiviĝi tiun projekton dank' al l' afableco de Sinjoro H. Hodler, kiu metode kaj talente priskribis la ĉefajn kuriozajn vidindajn en Ĝenevo. Nia kongresa Aldono estos por ĉiuj ĉarma memoraĵo de nia II^a Universala Kongreso.

Dimanĉon 2^{an} de Septembro.

Tago lasota al libera inklino de la kongresanoj. Diversaj kunvenoj.

Lundon 3^{an}, Mardon 4^{an}, Merkredon 5^{an} de Septembro.

Ekskursoj en Svislando: Ĝenevo, Montreux-Oberland, Spiez, Interlaken, Mürren, Berne, Ĝenevo.

Vidu tuj la programon ĉe la kongresa oficejo, 15, Quai de l'Île, Ĝenevo.

FESTOJ & FESTENOJ.

Merkredon 29^{an} de Aŭgusto. — Granda oficiala Festeno, en la kiosko des Bastions.

Prezo de la festena karto: fr. 2.50.

Ĵaŭdon 30^{an} de Aŭgusto, dum la ŝipveturado sur la Lago. — Granda festeno en Vevey, kun festo, oficiala akcepto, rabatoj sur la ŝnurtramoj ĉirkaŭaj, k. t. p.

Prezo de la festa karto: fr. 5.

Konkurso pri afiŝoj.

La gajninto de l' konkurso, en kiu partoprenis anoj de 5 landoj: Anglujo, Danujo, Belujo, Francujo kaj Skotlando, estas S^m Robert de Coninck, el Marseille, al kiu ni sendas niajn amikajn gratulojn.

Oficiala Himno de la II^a Kongreso.

La Loka Organiza Komitato de la II^a Kongreso elektis kiel oficialan kanton la belegan himnon « La Vojo », paroloj de D^m Zamenhof, muziko de Deshays, kun kvarvoĉa aranĝo kaj organa akompano de S^m M. de Ménil.

Ni esperas ke multaj kongresanoj volos partopreni en la ĥoroj, bonega rimedo por altiri la atenton pri la belsoneco de nia lingvo, rimarkinde valorigita per la muziko de niaj samideanoj, la konataj kaj talentaj muzikistoj.

Baronino von Suttner, « la vendredon 20^{an} de Julio, honoris la Londonan Klubon per sia ĉeesto ĉe ĉiusemajna kunveno. Ŝi diris al la klubanoj, ke tre plaĉas al ŝi tie troviĝi. Esperanto prezentas grandan intereson je ŝi, ĉar la celoj de Esperantismo kaj Pacifismo estas preskaŭ samaj.

Ŝi multespere atendas la gloran tagon, kiam oni diros «Demetu la armilojn kaj amu nin unu la alian», kaj ke oni ĝin diros Esperante.»

A. E. LAWRENCE.
Hon. Sekino
de l' Londona Klubo.

Oni scias ke «Demetu la armilojn» estas la titolo de fama libro de Baronino von Suttner.

Okazis en Tourne (Svisujo) kunveno de diverslokaj geesperantistoj, pri kiu longe raportis «Svisa Espero» (N^o 6, p. 42). Ni ricevis de S^o Ducommun tre belajn kaj pitoreskajn fotografadojn, kiujn, malŝate, ni ne povas represi pro manko de spaco, kaj kiuj montras bone, per la kontentaj kaj gajaj vizaĝoj de l' multaj ĉeestantoj — pitoreske grupigitaj ĉu ĉirkaŭ tabloj, ĉu sur deklivoj belege borditaj de majestaj arboj — kiel Esperanto taŭgas por krei korajn interrilatojn.

Oni ludis, sur natura arbara scenejo, ĉarmajn komediojn, inter kiuj «Perditaj en la arbaro» de S^{ino} Heuriet-Tuille, de La Chaux de Fonds, ludita de infanoj. Estus bonege, ke ĝi povus esti ludata en Genevo. Kore kaj entuziasme, la ĝeĉestantoj kantis «La Kapelo» de nia majstro, laŭ la bela muziko de S^o Ducommun, la sindona svisa propagandisto.

Sekcio industria kaj komerca de la esperantista grupo pariza.

Ĝus fondiĝis sub tiu titolo, komercistaro celanta interrilatigi fremdajn komercistojn ne sciantajn la francan lingvon, kun la pariza komercistaro. Por tio, la grupo transdonos senpage ĉiujn komunikadojn esperantajn al iu ajn, eĉ ne esperantista, el la komercistaro de Parizo kaj ĉirkaŭrbo. Estas dezirinde ke similaj oficejoj fondiĝu en ĉiuj ĉefaj ĉiulandaj urboj.

Post fondo de «Progreso», jen estas nova valora antaŭenpaŝo en la komerca bieno.

Dum la korekto de l' presprovaĵoj, ni eksciis plezure, de S^o Balliman, (21, Rue de l'Arbre-Sec, Paris), la agema sekretario de l' grupo, ke, jam, sufiĉe multe da grupoj fondiĝis, kun la sama programo, laŭ avoko kaj instigo de la pariza.

Dank' al l' afableco de S^o Fr. Schuck, ni povas enpreni la portretojn de kelke da la fondintoj de «Germanlingva Esperantista Societo» al kiu, denove, ni deziras rapidajn sukcesojn.

STELETO.

Nia amiko Kapitano Capé petas nin danki, je lia nomo, la multajn legantojn, kiuj lin gratulis pro lia ordeno.



TACKE. RUBRICHT. D^r BRACKE. BALDOW. JULES BOREL. ECKARDT.
BRÜHL. LUDWIG. BOCK. KÜCHLER. MIELCK. STEPHAN. CHRISTOFFEL. VOGLER. SCHAEFER.
D^r BLACHSTEIN. JEAN BOREL. D^r HANAUER. D^r MYBS. F^r JAHNS. SCHUCK.
KAMINSKY. BORNSCHEIN.

BIBLIOGRAFIO : « Elementa fotografa optiko », de KARLO-VERKS.

Ĝen estas libro tre atentinda por Esperantistoj, kies multaj estas fotografantoj-amatoroj.

Multaj el ili, kvankam posedantaj bonegan fotografilon, ricevas nur malbonajn kliŝojn, tial ke ili ne konas sian objektivojn ! Ili kulpigas la aparaton, ĝian reguligon, tiam kiam nur estas kulpa ilia nescio pri ilia objektivo, ĝiaj kvalitatoj tre ofte, tro ofte eĉ, malbone utiligitaj.

S^o Karlo-Verks, specialisto pri la fotografa fako, celis konigi elemente tion, kio estas objektivo.

La aŭtoro iras de l' simpla al la malsimpla, pritraktante sinsekve la jenajn temojn : optikaj fenomenoj de la lumaj radioj ; lensoj kaj objektivoj ; proprecoj de l' faskoj trairantaj lensojn ; objektivaj anguloj ; aberacioj ; klasigo kaj elekto de l' objektivoj ; kelkaj formuloj praktikaj.

La libro enhavas kelkajn klarigajn ilustraĵojn, kaj estas tre plaĉe eldonita, ankaŭ korekte verkita pri la lingvo. Tamen, al tiel severa kritikisto kiel S^o Karlo-Verks, oni havas rajton riproĉi kelkajn trouzojn de l' sufikso *ec*, kiuj pezigas la tekston kaj ŝajnas naski konfuzon eĉ ĉe la aŭtoro. Kial, ekz., reflektita ebena kaj reflekteca angulo. Ambaŭ rilatas fenomenon, kaj ne ŝajnas ke la angulo preparolata devas havi multe da reflekteco (pardonu pripenseco !) por scii ĉu jes aŭ ne, ĝi devas esti egala al la incida (kaj ne incidenceca) angulo ; kial fokusa longeco ? Estas nenio abstrakta en tiu ĉi kono ; eldistanco ne ŝajnas tre kontentiga por traduki la francan vorton « tirage ».

Pli grava estas la kritiko farebla pri diverĝi : ŝajnas al mi tute senutila, eĉ malutila, krei novajn vortojn pro la simpla kaŭzo, ke oni verkas teknikajn verkojn : ĉu nia admirinda lingvo ne ebligis tute nature, facile kompreneble por ĉiuj, alpreni disdeiri ; kaj alkuniri anstataŭ konverĝi. La unua vorto tradukas

fidele la germanan komunan esprimon *auseinanderlaufen* ; kaj nenio malhelpas ke tiu esprimo, kiu enhavas la difinon de l' fakto mem, estu uzata teknike. Se absolute oni volis uzi specialan vorton kiel teknika, estis necese inspiri sin de l' teknikaj vortoj diversaciaj ; la germana, ekz. estas *zerstreung*, kiu neniel rilatas kun *divergeco* ; kontraŭe, la germana *divergenz* estas uzata nefeknike ; kaj S^o Cart mem, pri la unua eldono de l' esperanta-germana vortaro de S^o Borel, kritikis la uzadon de iu radikvorto en senco alia ol tiu, kiun li havas en la lingvo el kiu ĝi estas ĉerpita, ĉar tiu uzado povas krei, ĉe la personoj parolantaj tiun lingvon, konfuzon kaj dubon.

Ŝajnas ke S^o Verks, kiu prave, en sia dediĉskribo, rekomendas sin je S^o Cart, sia profesoro de Esperanto, estus devinta apliki la principojn de tiu klera Esperantisto. Same, kunaliri, simetria je disdeiri, mi preferus je konverĝi ; ĝi ĝuste difinas la agon kaj estas uzata germane : *zusammenstreben*.

Tro da personoj atakas Esperanton, aparte en Germanujo, dirante ke ĝi estas nur latina lingvo, por ke, sen deviga neceso, ni donu novajn armilojn ĉiujfoje, kiam oni verkos teknikajn vortaron. Estas tie tre grava punkto, kaj la aŭtoro de *Anatomia vortaro* agis kiel indaj Esperantistoj, evitante tiun rifon. Kvankam Francoj, ili ne lasis sin hipnotigi de la francaj terminoj, kaj pro tio « ili meritis bone de la Esperantistaro ».

Lasante tiujn lingvaj rimarkojn, la verko de S^o Verks estas bonega, kaj, por niaj legantoj, mi deziras ke multaj Esperantistoj ĝin legu por ke neniuj povu diri, « mi sendus volonte fotografadojn por via bela revuo, sed mi ne estas sufiĉe lerta fotografo » (1,25 ĉe P. E. S., 33, Rue Lacépède, Paris).

A. MONTROSIER.



JUNAJ SIBERIAJ ESPERANTISTOJ.
S^{ro} R. Frenkel.



JUNAJ FRANCAJ SAMIDEANOJ.
S^{ro} Bord.

Tutmonda ligo de Instruistoj.

Ni parolis, en nia lasta numero, pri la Projekto de S^{ro} Romano Frenkel (Siberujo), pri «Tutmonda ligo de Instruistoj por la propagando de Esperanto inter la junuloj kaj infanoj, precipe inter la gelernantaro tutmonda».

Jen estas mallonga resumo de tiu grava dokumento.

Sinjoro Romano Frenkel rimarkigas ke, ĉe la infanoj, la ideo de artefarita lingvo estas kvazaŭ instinkta, natura. Kontraŭe la plenkreskuloj estas pli skeptikaj; kaj, eĉ kiam ili momente interesiĝis al la afero, ofte ili baldaŭ iĝas indiferentaj: *ili ne havas la tempon!*

Provo de enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kies inspektoro kaj instruisto li estas, donis al S^{ro} R. Frenkel mirindajn rezultatojn: multe da liaj lernantoj facile korespondas sen vortaro; ili plezure kaj flume legas la enhavon de la biblioteko de li kreita; ili ĝoje interrilatas kun junuloj diverslandaj: Francujo, Hispanujo, Holandujo, k. t. p.

Tiu sukceso decidigis S^{ro} Frenkel provi fondon de tutmonda ligo de instruistoj por la propagando de Esperanto inter instruistoj kaj lernantoj, junuloj kaj infanoj.

La tasto de tiu ligo estus:

1^o Organizado de propagando inter ĝeinstruistoj, per sendo de cirkuleroj en Esperanto instigantaj pri aliĝo al la ligo; propagando apud la instrua gazetero.

2^o Organizado de propagando inter la lernanta gejunularo, per oficialaj aŭ tolerataj kursoj.

Tre ĝuste S^{ro} R. Frenkel rimarkigas, en tiu paragrafo, ke la interŝanĝo de fotoĝoj, natursciencaj kolektoj, estus malkara rimedo por pliriĉigi la lernejajn kolektojn, tiel ofte malriĉaj, donante variajn temojn, por la lecionoj pri objektoj, kaj por la rakontoj pri fremdaj kutimoj, al la ĝeinstruistoj.

Ĝi la legado de la unua jaro de «Tra la Mondo» ne pravigas tute tiun diron?

Do, tiu propagando inter gejunularo havas kiel plenumo:

3^o Organizado de korespondado inter instruistoj kaj lernantoj de la tuta mondo.

4^o Eldonado de libroj por junuloj kaj infanoj. S^{ro} Frenkel petas, ke oni sendu al li tradukojn de naciaj krestomatiaj por infanoj.

5^o Organizado de liganaj kongresoj.

6^o Organizado de vojaĝoj de lernantoj kun instruistoj en fremdajn landojn dum la libertempo.

Estus facile, kredeble, organizi tiajn vojaĝojn dank' al la interrilatoj starigitaj, kun la helpo de fervojaj kompanioj kiuj, en multaj landoj, havas malkarajn opajn biletojn.

7^o Fondo de internaciaj libertempaj kolonioj, kie kuniĝus ĝeinstruistoj kaj gelernantoj diverslandaj.

Tiuj proponoj estas bonegaj. Kompreneble ĉiuj ne estas tuj efektiveblaj, sed ĉiuj estas pripensindaj. Pli kaj pli, Esperanto progresas en la lernejoj; malfeliĉe, oni ne konas ĉiam la gravajn rezultatojn akiritajn. La unua celo de la ligo, laŭ ni, estus interrilatiĝi ĉiujn, kiuj interesiĝas je la demando: Esperanto ĉe la junularo, al ili konigi ĉiujn progresojn, kaj ilin konigi al la naciaj gazeteroj, penadante gajni tiujn ĉi, por ke ili subtenu la aferon. Ĉar per la gazetero, kaj nur per ĝi ni venkos, tial ke, en nia epoko, ĝi povas multe fari por gajni la publikan opinion, kaj prepari la registarojn kaj parlamentojn.

Finante, S^{ro} Frenkel faras proponojn por la organizo de la ligo, kies organo povus esti «Juna Esperantisto».

Li petas tiujn, kiuj interesiĝas je lia projekto sendi al li (En Enisejsk, Ruslando, Siberio. Al R. Frenkel, insp^o de gimnazio):

1^o Sian adreson.

2^o Adresojn de lernejoj, instruistoj, lernantoj, k. t. p.

3^o Fotoĝojoj de instruistoj kun iliaj lernantoj.

4^o Vidajojn de lernejoj, klasoj, kabinetoj, k. t. p.

Interŝanĝe, li sendos samajn dokumentojn.

Estas dezirinde ke la multaj ĝeinstruistoj, kiuj certe ĉeestos la kongreson, ekzameni zorge la «Projekto» de S^{ro} Frenkel.

A. MONTROSIER.

La ĉi suba artikolo montras ke la alvoko de S^{ro} R. Frenkel estos certe aŭdata.

Junularo.

Tra la Mondo zorge enpresas la progresojn de Esperanto ĉe la junularo. Volonte ĝi rediras kune kun Rektoro Boirac: «*Propagandi nur inter la plenaĝuloj estas kvazaŭ klopodi por pleniĝi la barelon de la Danaidinoj.*»

Sed nia legantaro rigardu la portretojn de la junaj esperantistoj de Enisejsk kaj de Beaune, kaj ĝi estos rekuragigata pri la estonto de la L. I. Kiu estus pensinta, antaŭ kelkaj jaroj, ke la junularo de Burĝonjo kaj de Siberujo amike interŝanĝus P. K., leterojn, t. e. ideojn? Mirinde! Nun interkompreniĝas facilege la landanoj de la ora suno, kiu maturigas la vinberojn, kaj de la arĝenta suno, kiu pale lumigas la senfinan neĝan kampanon...

La «Verda Stelo» (25 lernantoj — 12-17 jaraĝaj) estas filio de la grupo de Beaune. Tiu ĉi agema grupo, de 1903, senĉese laboradis por atingi kelkajn precizajn celojn:

1^o Disjeti la bonan semon en la Burĝonjan regionon. Bonega estis la rikolto. Per paroladoj de S^{ro} Bord, naskiĝis la grupoj de Chalon sur Saône, Mâcon, Le Creusot.

2^o Per someraj ekskursoj, unuigi la gesamideanojn. Ekzemple: la 10^{an} de Julio, cent ĝeesperantistoj grupiĝis en Nolay, kie, sub la verda flago, antaŭ la bronza statuo de mirigita eksprezidanto Carnot, ili ĥore kantis:

en la mondon venis nova sento...

3^o Enkonduki E. en ĉiujn lernejojn. Tial kursoj estas farataj ĉe Liceo en Mâcon, terkultura lernejo de Fontaines, unuagrada knabina lernejo de Beaune, kolegio de Beaune.

La Verda Stelo, kiu jam per ekzamenoj sukcese akiris 26 atestejn pri lernado kaj unu ateston pri kapableco, korespondas kun siaj kamaradoj de la tutmondo: en Anglujo, Germanujo, Bohemujo, Japanujo, Siberujo.

Ĝi atente rigardadis la energiajn simpatiajn vizaĝojn de la junaj Siberanoj kaj precipe de ilia profesoro Romano Frenkel. Tiu ĉi inspektoro kaj profesoro proponas fondi tutmondan ligan de instruistoj por propagando de E. inter gelernantojn. Li skribas: «*Memoru ke estas pli facile esperantigi grupiĝis en Nolay ol unu plenaĝulon*», kiu ĉiam ekdiras: «*mi ne havas tempon por lerni.*» S^{ro} Frenkel aldonas: *Inter miaj lernantoj jam troviĝas multaj tre fervoraj esperantistoj, kiuj ne preskaŭ bezonas vortaron por legi aŭ skribi.*»

Do, estas la junularo kiu plenumos la Danaidinan barelon!

BORD

Prezidanto de la «Verda Stelo»



La Mejje (3987m).

En la franca provinco Dauphiné, ĉe la fundo de l' valo Oisans, kaj apartigante ĝin de l' Durance'a valo, kuŝas aro da glaciejoj, kies ĉefaj pintoj La Mejje, Les Ecrins, Le Pelvoux kaj L'Aiguille d'Olan atingas proksimume 4000 metrojn de alteco. Oni povas ataki tiun montaron sur tri flankoj; de La Bérarde okcidente, de La Grave norde, kaj de Vallouise oriente. La grimpuloj, ĝenerale, iras al La Bérarde, tial ke tie, en la bona hoteleto de l' Societo de l' Dauphiné'aj Turistoj, ili estas preskaŭ en la centro de l' montaro, kaj povas elekti laŭvole la ascendotajn pintojn. Sed la ordinaraj vojaĝantoj kontentiĝas admirante La Mejje en La Grave, aŭ Le Pelvoux en Vallouise. Tiuj montoj povas esti kalkulataj inter la plej belaj, pro tio ke la okuloj povas flugi, per unu salto, sen io kiu rompas la rigardon, de la piedo ĝis la supra pinto.

Nia fotografo montris la supron de la Mejje, kiu staras rekte antaŭ la monta urbeto La Grave. Ĉiam, ĉe la teraseto antaŭ la hoteloj, vojaĝantoj sidas rigardante al la neĝaj deklivoj, aŭ kelkfoje sekvas per lornoj nigrajn punktojn, kiuj estas turistoj en la danĝera entrepreno surgrimpi la pinton. Tiu kiu povos pasigi unu tagon en La Grave, bone faros suprenirante monton post la urbeto. Ju pli ĝi grimpos, des pli la Mejje ŝajnos altiĝi, kaj etendi antaŭ ĝiaj okuloj la faldojn de sia blanka mantelo. En la vilaĝoj, la montanoj ĝin instruos pri sia vintra vivo, kiam, forlasinte la superajn ĉambrojn

tro penetreblajn de l' frosto, ili ekloĝas sub la ark-
aĵoj de stalo, kie la bovinoj varmigetas la aeron. — Ĉar la Mejje kuŝas ĉe la sudo de La Grave, la urbeto estas senigata de l' Sunaj radioj, ĉe la najbareco de l' vintra solstico; kaj kiam la astro reaperas, la loĝantoj ordiĝas ĉe la pordoj de siaj enneĝigitaj domoj, por ĝui ĝiajn retrovitajn radiojn. — Cetere, la vojaĝanto, kiu tro rapide paŝas, ne konscias pri la diversaj aspektoj de la monto. Tage ĝi plenigas la atmosferon de sia radianta kaj brulanta lumo. Vespere, kiam ĝia kapo roziĝas, kaj ĝia spiro freŝigas l'aeron, ĝi aperas kiel la vera imago de pureco kaj paco. Sed nokte, ĝi, tute ŝanĝinta, ĵetas malvarman kaj kruelan helaĵon. Tiam, malvole impresita, oni memoras ke, post tiu grandega maso, en angulo de vilaĝa tombejo, dormas sian lastan dormon du turistoj, el tiuj, kiujn la monto mortigis en siaj koleraj tagoj.

La vojaĝantoj, kiuj amas la larikajn arbarojn, povos restadi sur la alia flanko de kolo Lautaret en urbeto Monetier, kie estas baneja stacio. (Ho! tute ne luksa!) aŭ en Briançon. Tiu, kiun ne timigas malriĉa vilaĝa gastejo, iru ĝis Nevaches, en ĉarman valon, kie kristala rivero serpentiras tra larikoj.

Sed, kara leganto, kie ajn vi pasigos la tempon en tiaj altaj lokoj, la sekeco de l'aero kaj la granda temperatura ŝanĝo de tago al nokto, fortikigos vian korpon, samtempe kiam la pura spiro de l' montoj freŝigos vian animon.

H. SENTIS.

Jonglajoj kaj Eksperimentoj de Jan Saks.

Esp. teksto de AMATUS (Belgujo).

Ŝanĝitaj jetostoj.

La jonglito senatente jetas du jetostojn sur la tablon, kaj ekvidas ekzemple, ke ili montras la nombrojn 5. (Fig. 1).

Li turnas lerte la manon por jeti la jetostojn kiel montras Fig. 3, do, montrante la sumon 8, kiun ĉiuj supozos troviĝi kontraŭe je 5, sed ne troviĝas tie; por fari tion li faris la movon montratan per Fig. 4.


Li bone rimarkigas ke la sumo estas 8, kaj dirante tion li tenas la jetostojn kiel estas montrata per Fig. 4.

Nun li diras al la rigardantoj: Vi vidas ke la malsuperaj facetoj formas kune la nombrojn 8; nu, mi ŝanĝos tion, aldonante unu punkton per simpla frapeto sur la jetostoj.

Efektive, post tiu ĉi frapeto, la mirigataj rigardantoj konstatas, ke la kubetoj montras 9 punktojn anstataŭ 8, kiel la jonglito antaŭdiris.

Por kompreni la artifikon oni nur bezonas scii, ke la ordo de la punktoj sur la jetkubetoj ne estas laŭvola, sed okazas laŭ fiksa regulo: du kontraŭmetitaj facetoj formas ĉiam la nombrojn 7, do ĉe la tiuj ĉi jetostoj sume 14.

Se nun la jonglito ekvidas 5 kiam li jetas la kubetojn, simpla substrakcio sufiĉas por trovi ke sur la kontraŭa faceto oni trovas $14 - 5 = 9$.



Pri la pezocentro.

Homo nur povas sin teni rekte tiam, kiam la pezocentra vertikalo trafas la supraĵon, sur kiu li staras. Por vidigi tion, nia figuraĵo montras al ni amuzan pruveton.



Oni metas malaltan seĝon sen dorsapogilo proksime de muro, kaj samtempe oni tuŝas la muron per la kapo. Kiam oni volas levi la seĝeton, oni trovas ke tio estas se ne tute neebla, almenaŭ tre malfacila.

Efektive, la pezocentro ne plu troviĝas sur la vertikala linio trapasanta la piedojn de tiu, kiu efektivas la eksperimenton.

Oni povas klini la kapon antaŭen aŭ malantaŭen, dekstren aŭ maldekstren, tiel longe kiel la pezocentro ne falas ekster la fundamento, sur kiu oni troviĝas. Se tiu pezocentro estas translokita nur kelkajn milimetrojn eksteren, oni devas etendi alian korpoparton por ripari la pezegalecon; tial oni etendas unu brakon, kiam oni portas plensitelon da akvo je la alia flanko.

AMATUS.



La Hundo de la studento.

Unu el miaj kamaradoj (tiam mi estis studento de medicino) havis belegan pudelon blankan treege inteligentan. Ĉiutage la besto akompanis sian mastron ĉe la kursojn de la profesoro. Tie ĝia sintenado estis perfekta, ĝi aŭskultis silente kaj serioze, kvazaŭ ĝi estus volinta kompreni ian rebrilon de la homa penso. Sidanta sur la benko kun la okuloj direktitaj al la profesoro, kiu, mi devas tion konfesi, estis tre miopa, ĉirkaŭita de libroj, nia kvarpiedulo ŝajnis kompreni la lecionon.

Ian matenon pluvis, kaj la ĉambro, kiu cetere neniam estis tre plena, estus estinta tute senhoma sen la ĉeestado de la studento al kiu apartenis la hundo. Eksterordinare, li estis lasinta ĝin hejme.

« Sinjoroj, — tiam diris la miopa profesoro komencante sian lecionon, — mi estas malgaja vidante ke la studento kun la blanka palto, kies akuratecon kaj atenton mi ne ĉesis admiri, kontraŭ siaj kutimoj forestas hodiaŭ. »

D. M. P. G.

Kurioza instinktaĵo.

Leporo persekutata de hundaro kaj baldaŭ atingota ekvidas sur vojo azenon ŝarĝitan de ĉasaĵo. Per rapida saltego ĝi eksaltas en unu el la korboj, kie kelkaj el ĝiaj similuloj estas kuŝigitaj, kaj enmiksas sian korpon inter tiujn malvivulojn.

Hundoj kaj ĉasantoj baldaŭ alvenas sed vane serĉas ian postsignon, ĝis kiam la ĉasantoj senkuraĝigitaj kunligas la hundojn kaj forlasas la lokojn....

Tuj kiam ĉio refariĝis tute trankvila, nia leporo resaltas teren kaj galopete foriras, antaŭ la mirigata rigardo de la azenisto.

Esp. AŭG. BAISSAC,
el Konstantino (Alĝerio).



FELIETONO

Posta Amo.

Hispana, de JOHANO MUNOZ KAJ PABO'N, Noveleto.

Tradukita de JOHANO GARCIA MARTIN, el Ubeda (Hispanujo).

Al Fino Mario Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Fraŭlino, pro la rajto, kiun mi havas, kiel poŝtkartokolektanto, mi kuraĝas sendi al vi tiun ĉi poŝtkarton, por ke vi havu la bonecon ĝin interŝanĝi per alia de vi skribita. — Je tia okazo mi prezentas min antaŭ vi kiel ĝentila servulo, kiu kisas viajn piedojn.

Imagurbo, la 3an de Majo de 1905.

KAROLO VERGARA.

Al S^o Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia tre respektinda Sinjoro. Plezurege mi ĵus ricevis vian antaŭhieraŭan poŝtkarton, kiun mi tuj respondas per tiu ĉi. — Al mi ankaŭ faras grandan plezuron min prezenti al vi kiel respektema servulino, kiu al vi kisas la manojn.

Ajnvilaĝo, la 5an de Majo de 1905.

MARIO LASSO.

Al Fino Mario Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Mia tre respektinda kaj aminda Fraŭlino. Vin lasante tute libera por respondi aŭ ne, la ĝentileco min devigas montriĝi al vi danka pro via poŝtkarto, per kiu mia kolekto estas denove pliriĉigita. — Ĝi estas belega kaj ĝi metas inter l'artistaron sian elektintinon. Mi opinias, ke via gusto estas bona kaj via skribo neimitebla.

Via dankema servulo, kiu kisas viajn piedojn.

7, V, 1905.

KAROLO VERGARA.

Al S^o Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia respektigata Sinjoro. Vi estas tiu, kiu meritas dankojn, tial ke vi favoris min unue per via belega poŝtkarto. Mi nur respondis tiam, same kiel mi nun denove respondas. — Mi ne scias kial vi diras, ke mi havas ŝatindan guston; iu ajn elektas beletan poŝtkarton.

Via ĝentila servulino, kiu kisas viajn manojn.

9, V, 1905.

MARIO LASSO.

Al Fino Mario Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Fraŭlino kaj..... mia amikino? Ne; ĉiuj akirantoj de poŝtkartoj ne havas sufiĉe da artista distingemo por elekti vere tre belajn poŝtkartojn, kaj plie tion malestimis, kio estas nur ordinara kaj bruliginda. Estetika gusto pli forestas ol oni ĝenerale opinias. Vi, do, aŭ estas vera artistino aŭ vi posedas bongusteman personon, kiu liveras ilin al vi. Mi gratulas vin pro unu aŭ..... pro alia.

11, V, 1905.

KAROLO VERGARA.

Al S^o Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Sinjoro kaj amiko mia. Belaj aŭ malbelaj, artistaj aŭ malartistaj, mi havas nek liveranton nek liverantaron por miaj poŝtkartoj. Nur mi elektas ilin per mia malklera, vilaĝana, gusto kiel sola taksilo. Nun mi ĝin trovas bona, ĝin vidante ĝuste simila al la via. — Al vi kisas la manojn via fidela servulino kaj konsekvence amikino.

13, V, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Amikino mia. Vi tute ne povas kompreni la ŝarĝon, kiun vi ĵus estas demetinta el mia kapo, sciigante min ke vi neniam havas, kiu al vi liveras poŝtkartojn. Mi tion diras..... ĉar la bongusto prezidanta ilian elektadon, estas nur ŝuldata al vi, por kiu, nekonante vin, tre vivplenaj simpatioj naskiĝis ĉe mi. — Ĉu vi ne estas tre gracia kaj ĉarma? Mi tute ne scias kial mi imagas vin *blondeta*. Cu vi estas tia?

Via fidela amiko kaj servanto.

15, V, 1905.

KAROLO.

Al S^o Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia respektiga, amema amiko. Mi ne scias kiel ĝin diri al vi, ne estante prijuĝata samtempe de vi kiel malĝentilulino. Sed fine mi kuraĝas sciigi vin ke: mi opinias ke vi..... (kiel simpla korespondanto) okupiĝas pri tio, kio ne vin koncernas; sed, ĉar vi estas tiel demandema, mi diros al vi, ke mi estas nur..... via tre bona amikino kaj nenio plu.

17, V, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Fraŭlino Marinjo. Vi estas bona amikino mia kaj samtempe vi lasas min suferanta pro la plej turmentantaj duboj. Ne estu tiel kruela kaj plenumu malgrandan deziron de iu, kiu tute *oferus* sian animon por ia ajn el viaj eĉ malgrandetaj deziroj. Mi tiel ŝatas la blondajn harojn !... kaj la klarigmanierojn de iaj personoj!

19, V, 1905.

KAROLO.

Al S^o Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia turmentata kaj vivega amiko. Ĉagrene mi vidas ke nia interkorespondado estas metita de vi en komplikegan kaj eble gliteman situacion. Mi opinias ke, por sola amuza sporta korespondado, estas senbezone sciigi pri la harkoloro de l'interkorespondantoj. — Ne marŝu, mi petas, sur tia vojo, kaj mi estos via plej karesema amikino.

21, V, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Precize, amikino mia. Kió komenciĝis kiel simpla amuzajo, tio aliformiĝis, kun granda plezuro de mia koro, en ion ajn pli gravan, pli vastan, pli amplekse-gan..... Kion vi suferos klarigante tion al mi? Tiel agu kaj pro tio ankaŭ estos al vi dankega.., via tre fervora.

23, V, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia tre respektinda kaj konsiderinda Sinjoro. Eble vi kutimas atingi ĉiam, kion vi deziras; kaj needukita volo estas ja tre grava malhelpaĵo por trafi homan feliĉecon. — Penadu, mi petas, potenci vian volon, kaj faros al vi grandan plezuron la maldoĉeco mem de via menvenkado.

25, V, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Mastrino mia kaj amikino. Kvankam mi nature abomenas doktorinojn kiel ekskatedre parolantajn, tamen viaj instruajoj tre plaĉas al mi kaj eĉ min enamigas. Mi tute ne scias, kiajn maloftan virton kaj nevideblan ensorĉon viaj paroloj entenas, ĉar mia animo ilin, nediskutinte, tuj akceptas. — Mi prizorgos pri mia edukado por tiel plenumi viajn dezirojn. Via sovaĝa amiko.

27, V, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia Sinjoro kaj amiko. Ne montrante min kiel doktorino, jen popoldiro: « Ĉiu ekstremaĵo estas danĝera, » kaj vi por ĉio montriĝis kiel ekstremulo. Mi ne nomis vin sovaĝa, nur mi diris ke via volo estas needukita. Se vi volos igi ambaŭ vortojn samsencaj, tion pro vi tre bedaŭros via tutkora amikino.

29, V, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Marinjo.... sen poseda pronomo. Tiel laŭvorte mi plenumis vian konsilon pri venko de mia needukita kaj brava volo, ke mi sciigas vin, per honora parolo, ke estas jam por mi afero tute indiferenta scii ĉu vi estas *blondeta* ĉu ne. — Ĉu vi estas albinosa kiel Ofelio, ĉu vi estas brunega kiel Ajdo, tutkore vin amos ĝis la morto,

31, V, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Pro amo al Dio, mia bona amiko, ĉesigu nian interkorespondadon aŭ penadu nur paroli pri poŝtkartoj kiel en la komenco. Atentu pri tio: oni ne ludas je iaj aĵoj. — Mi plu ne diras al vi.... Adiaŭ.

2, VI, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Ĝi ne estas ludo, mia kara, kaj se ĝi estas ludo, ĝi estos simila al tiuj de la Roma areno, kiuj ĉiuj finiĝis per la morto de la gladiatoro.... Movu, mi petegas, unu fingron, kiel Cesaro, kaj savu la vivon de tiu ĉi mortonto kiu vin salutas.

4, VI, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia respektigata Sinjoro kaj amiko. Mi kredas, ke estas bonaĵo, kiun vi ĝis nun faris, sed la ŝerco sufiĉas. Aŭ vi estas tre bruleblema, kaj tio estas tre danĝera por vi kaj..... por la ceteraj, aŭ vi havas tro da bona humoro. — Zorgu pri kuracado de unu aŭ de alia, kiel deziras via tutkora amikino,

6, VI, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Malamika amikino mia. Forpuŝante la duan, kiel blasfemon, mi klopodos por min kuraci je l'unua, kvankam sen sukceso, laŭ mia opinio. Viaj poŝtkartoj, pecetoj de via animo, de mi metitaj en paperujon sur miau koron, estas tre facilbrulanta meĉo kaj, kompreneble, mi nepre flamiĝas per ĝia ektuŝo. De tia brulado, tamen la flameco estas tiel dolĉa, ke eĉ terurigas min la ekpenso pri tiea ĉeestado de ia brulestingisto.

Via fenikso,

8, VI, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Ĉu estas tie, mia amiko kaj Sinjoro, nenia kontraŭ bruladoj asekursocieto? Tre bedaŭrinda estus la brulumado de persono tiel simpatia kaj estiminda, kiel vi sendube estas. Asekurigu do; kontraŭe forigu la danĝeron; vi ja scias ke diablo alvenas, tute ne atendite, kaj lerte blovas. Atentu do: vi estas tia..... fenikso! Mi ne volas eĉ pri tio ekpensi!

10, VI, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Jes, Fraŭlino, jes: tie ĉi ekzistas asekursocieto kontraŭ bruladoj; sed mi neniel asekurigos, dum vi ne diros al mi fidele, ĉu tie estas brulestingisto ĉu ne. Pripensu, mi petas jenan kontraŭdiron: se ĝi estas, mi asekurigos, kaj se ne, ne.

Via hidrofobiulo,

12, VI, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Via kateĥisma moŝto. Vi kutimas pli demandi ol estas via rajto; tamen mi respondos vian insistan demandon. Per mia honoro, brulestingisto nenia estas tie ĉi. Tamen, ne lasu vian asekurigaĉon forgesita. Estu ni geamikoj, ĉar amiko estas trezoro, kaj domaĝe estus se ni malprofitus unu la alian. Vi ŝajnas al mi bona kaj — rilate al mi — mi estas pli bona... kiel amikino.....

14, VI, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Mia nevundebla amikino. Kial nur geamikoj kaj ne.. iom plie? Tiun ĉi proponon pravigas la tiea neĉeestado de brulestingisto. Ni profitu unu la alian, ĉar, se amiko estas trezoro, kio estos unu.... (Tien ĉi metu estantan partupon). Ĉu vi permesas ke mi diru ĉi al vi? Tio estas la sola parolmaniero uzinda inter.....

Via eksamiko,

16, VI, 1905.

KAROLO.

(Daŭranta).

JOHANO GARCIA MARTIN,
(Hispanujo).

Niaj anoncetoj.

Por plenumi peton de kelkaj samideanoj, ni plimalgrandigis la koston de niaj anoncetoj. Ĝi estas, nun, 1 fr. 25 por kvarlinia anonco (33 literoj en ĉiu linio). Ĉia plua komencita linio kostas 25 cent. (Pageblaj poŝtmarke).

Oni bonvolu skribi legeble kaj sur aparta papero.

S^o Benjamim C. Camozato, P. Alegre, Rio Grande do Sul, Brazil, deziras interŝanĝi p-k. esperante skribitajn.

La jenaj lernantoj de S^o Romano Frenkel, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun esperantaj kolegoj:

Vidu aliflanke
la anoncoj pri niaj
Novaj propagandaj
ilustritaj
POŝTKARTOJ

1. Inokentio Nikolaev. 2. Nikolao Aleksandroviĉ. 3. Ivano Sekistov. 4. Nikolao Kozirev. 5. Nikolao Umanskij. 6. Nikolao Sergijejskij. 7. Akilo Orlov. 8. Konstantino Znamenskij.

Adreso: Enisejsk, Ruslando, Siberio, S^o... lernanto de l' gimnazio. (Paĝo 20).

La numeroj estas skribitaj sur la grupo: Junaj Siberiaj Esperantistoj.

Korespondo.

S^o J. Davidov, (Siliŝtra-Bulgarujo). La kosto de via anonco estos 1 fr. 50. Bonvolu ĝin sendi poŝtmarke, aldonante 0 fr 10 por la ŝlosilo mendita.

Novaj propagandaj revuoj

« Pola Esperantisto » eldonata en Leopolo, kiu celas diskonigi kaj disvastigi Esperanto ĉe la pollingvaj landoj. Ĝi do estas presata du lingve, kaj donas bonajn esperojn laŭ sia enhavo. Aparte ĉitindaj, la ĉefa artikolo de Ing. Ed. Libanski, kaj Fabelo greka, de St Lazica (Unu N^o 20 h. S^o St. Lazica, Leopolo).

« Idealo » tutesperanta ekaĝa revuo, organo de « Sicilia Federacio Esperanta » de « Malta Stelo » kaj de « La Fasko » humana kunfratigo internacia. Ĝi donas interesajn sciigojn pri la Esperantista movado en la grupoj, kies oficiala organo ĝi estas (Ab : 3 fr. ĉiulan de — Ĉe D^o Vitangelo Nalli, Corso Calatafimi, 495 Palermo, Italujo).

Bonega propagando estas ĵus farita de S^o Gr. Chalot, la sindona sekretario de la Grupo esperantista de Toulouse, kiu, ĵus ricevita Doktoro de Medicino, dediĉis Esperante sian tezon al « Nia kara majstro, D^r L. L. Zamenhof ».

Niajn gratulojn, al la nova Doktoro, kaj al la ĉiam propagandisto.

Bonega artikolo de nia kunlaboranto Ch. Brunet en « Cycle et Automobile industriels », en kiu la aŭtoro insistas pri la utileco de Esperanto ne sole por la turistoj sed ankaŭ, konsekvence, pri tiuj kiuj okupiĝas pri cikloj kaj aŭtomobiloj.

FERVOJOJ de PARIS ĝis LYON kaj LA MÉDITERRANÉE

Rilatoj inter LONDON, PARIZO, SVISUJO kaj ITALUJO

Per PONTARLIER kaj SIMPLON.

Luksa vagonaro trion-semajna « Simplon-Oberland-Ekspres » konsistanta el lit-vagonoj kaj el restoraci-vagono. Ĝi alterniras inter Calais, Paris, Berne, Interlaken, unupartite ; Lausanne, Zermatt, Brigue, Milan, aliparte.

IRO

London' — deiro 11 h. matene
Calais — » 2 h.55 vespere
Parizo — » 7 h.30 »
Berne — alveno 6 h 35 matene
Interlaken » 8 h.25 »

Lausanne alveno 6 h. matene
Zermatt » tagmeze 50
Brigue » 8 h.58 matene
Milano » tagmeze 32

Lunde,
Merkrede
Sabate
deiro je l'
de Londono
kaj
de Parizo

REIRO

Milano — deiro 4 h.25 vespere
Brigue — » 8 h.42 »
Zermatt — » 6 h.06 »
Lausanne — » 11 h.42 »

Interlaken — deiro 9 h.32. vesp.
Berne — deiro 11 h.08 »
Parizo — alveno 7 h.15 mat.
Calais — » 1 h.15 vesp.
Londono — » 5 h.04 »

Marde
Jauĉe
Dimanĉe
je l'deiro
de Berne
kaj
de Milano

Daŭra vagonaro inter Calais kaj Milano Lasta deiro de Parizo al Berne kaj Interlaken, la 15^{an} de Septembro.

Daŭra vagonaro inter Milano kaj Calais. Lasta deiro de Berne kaj de Interlaken la 16^{an} de Septembro.

Sinjorinoj !

Se vi volas ne plu suferi je la monataj sangel-fluoj aŭ je la epoko de ilia malapero, ensorbu la

DRAGÉES BLOTTIÈRE

sendangeran produktaĵon, bombonforman, kiu tuj kaj certe forigos la doloron. Por havigi la Dragées Blottière, sendu 2.25fr. poŝt-aŭ kartmandate, 102, Rue Richelieu, PARIS.

Petu en ĉiuj magazenoj

de Ĝenevo kaj de Svisujo

la artplenajn poŝtkartojn

(SVISAJN-VIDAĴOJN).

ELDONO

CHARNAUX Fratoj kaj K^{io},

en Ĝenevo.

FRANÇOIS COPPEE

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE

AUGUSTE MONTROSIER



PARIZO - 75 CENTIMOJ

PARIS

ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO

21-23, PASSAGE CHOISEUL, 23-21

80 DUCLES

Carma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.


Ĉe « Tra la Mondo ».

BUFEDO DE MACON
KORESPONDAS ESPERANTE.

ANGLA-ESPERANTA LERNEJO POR KNABINOJ.

Tutjarloĝantinoj. Fraŭlino EVERDELL L. L. A. College House, Bridgwater, Somerset, Anglujo.

— Korespondas Esperante. —



Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante redaktata, *oficiala* revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. ABONO: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante. JARABONO: 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

LA BELGA SONORO.

Bonega propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Unu el la plej malnovaj kaj seriozaj gazetoj Esperantaj.

Sciigoj — Literaturo — Scienco
Eliras ĉiumonate. Abono: 4 fr. jare. Kolektoj de antaŭaj jaroj: 6 fr. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique) kaj ĉe *Tra la Mondo*.

SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Abono 3 fr., unu numero 30 cent. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

ESPERO PACIFISTA.

Monata organo de l' *Esperantista Societo por la Paco*. Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo), 5 frankoj. Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

THE BRITISH ESPERANTIST.

oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

ESPERANTA STUDENTO.

Ĉiumonata gazeteto celanta interrilatigi kaj laborigi la gekomencantojn. Zorge eldonita skribmaŝine kaj kopimaŝine, kun spritaj plumdeseĝnaĵoj.

Jarabono: Granda Britujo: 2 s. 6 d.; Eksterlandoj: 3 fr.; unu kajero: 0 f. 25 c. Ĉe Fino Oxenford, 16, Upper Westbourne Villas, Hove, Sussex, England.

SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

LA REVUO.

internacia monata literatura gazeto, kun konstanto kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

UNUA PAŜO.

Monata bulgara gazeto en Esperanto. Pri-traktas speciale bulgaraĵojn: morojn, literaturon, k. t. p.: jare, 3 fr.; duonjare, 2 fr. — Ĉe S^o S. Petkov, 26, Strato San-Stefano, Sofio, Bulgarie.

LINGVO INTERNACIA.

Monata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulanda. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komencigo de ĉiu monato.

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

ESPERANTISTEN.

Svede kaj esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ĉiumonata organo de la S-to «Espero» en lingvoj Esperanta kaj parte en rusa — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio; sociala politika fako; novaj famaj beletristikaĵoj (interalie en 1906 j. estos presata la «Ruĝa Rido» de L. Andrejev), versaĵoj kaj mult. al. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj, senpage. — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la S-to «Espero») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, St. Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, al la S^{to} «Espero.»

« ESPERANTO-JOURNAL »

Eliras ĉiudimanĉe — France kaj Esperante.

Ĝin postulu en ĉiuj francaj stacidomoj kaj ĉe libristoj — Unu numero 10 centimoj.

Abonoj, 24 numeroj. Franc- & Svislando: 3 fr.; aliaj landoj: 3,75. Pago per poŝtmarkoj estas akceptata je 10 % dealkulo.

Administranto de «Esperanto-Journal» en Genève (Suisse) & Bellegarde (Ain, France).

JUNA ESPERANTISTO.

Tute Esperante-Divastigo de Esperanto ĉe la junularo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Vollandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

ĈILIO ESPERANTISTA.

Senpaga organo propaganda, hispane kaj esperante. Ĉe S^o L. E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1989 (Santiago-Chile).

ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Scienca kaj literatura. 4 fr. ĉiulanda. Ĉe S^o Marich Agoston, Pápnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — Ĉe S^o Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu N^o afrankita 0 f. 50 Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

Les Annales politiques et littéraires.

Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris.
Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' «Carnet de la mutualité des Annales» (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

La plume Sténographique de France.

Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro} L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

LA INTERNACIA TRINKAĴO!

Viskio Esperanto

Registered trade mark Marque déposée
N^o 270,042. N^o 13,195
Registered Label N^o 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la aŭŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & C^o

GARTLAND STREET,

GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

S^o ĈEFECĈ

eldonis interesan statistikon montrantan ke, el 100,000 ŝlosiloj venditaj, 43,850 ĉiulingvaj iris Grandan Britujon; 19,500 Francujon; 14,450 Germanujon la resto en aliaj landoj; 5,100 Unuigitajn Ŝtatojn. Tio refutas bonege per ciferoj la opinion, ke Esperanto nur taŭgas por latinlingvanoj.

La sama propagandisto ankaŭ eldonis novajn signojn, kiuj certe havos grandan sukceson: modelo stelforma 65 centimojn (10 ekz. 5 fr.); stelo kun randa ĉirkaŭskribo «Esperanto, Lingvo Internacia», 1 fr. (45, Christchurch Road, Streatham Hill, London, S. W. 11.)

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Algerio;

1 f., afrankite, ĉiu dekduo.
Propagandaj poŝtkartoj de «Tra la Mondo»
fr. 1,50 ĉiu cento.

ĈE «TRA LA MONDO».

Ilustritaj poŝtkartoj propagandaj.

kun belaj vidaĵoj elirtitaj de

«TRA LA MONDO»

La serio (6 k.), afr.: 0 fr. 40

5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50

10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50

15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75

Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue.

Pageblaj poŝtmarke aŭ monpapere.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.